ADA CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO

DUA VOLUMO

BUDAPEST 1999



Kálmán Kalocsay

(1891-1976)

Ada CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY
EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO
PRI LIA VIVO KAJ PLENA VERKARO

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO

Dua volumo

Budapest 1999

Copyright © Budapest, 1999. Ada CSISZÁR

Respondeca eldonanto: Ada CSISZÁR
KAL-ĈI Dokumentaro, Budapest, 1999.

ANTAŬPAROLO
Al la unua volumo

Tiu ĉi libro celas -- krom la omaĝo al d-ro Kálmán Kalocsay -- ke la riĉa spirita heredaĵo de nia klasikulo fariĝu komuna trezoro de la esperantistaro.

La libro enhavas plurcent indikojn de la giganta verkaro de Kalocsay. Liaj artikoloj estas listigitaj laŭ temoj, poemoj kaj tradukoj laŭ titoloj. La kunmeton riĉigas mozaikoj el la movado, kiuj pli malpli apartenas jam al la historio de Esperanto. Apud la centra figuro de Kalocsay, en la fono aperas -- eĉ se kelkfoje ombre -- pluaj rolantoj: parencoj, kolegoj, eminentaj kaj malpli konataj esperantistoj vivantaj en la epoko de Kalocsay.

Klasifiki tiun verkon -- laŭ literatura genro -- ne estus konvena, ĉar ĝi enhavas materialojn plej diversajn: bio-bibliografiajn indikojn, erojn el la verkoj de Kalocsay, eseojn, rememorojn, intervjuojn, anekdotojn, leterfragmentojn, fotojn, poemojn, citaĵojn, ktp.

La aspekton kaj la personecon de Kalocsay bone prezentas pli ol ducent fotoj kaj rememoroj de samtempuloj, kiuj havis bonŝancon renkontiĝi, kunlabori kaj esceptokaze amikiĝi kun tiu geniulo. La personeco kaj la agado de Kalocsay estis tiel multflanka, ke mi dediĉis al ĉiu "faceto" apartan ĉapitron, ene subĉapitron eĉ subsekcion. Tiu ĉi aranĝo faciligas orientiĝon al personoj, kiuj deziras ĝin studi. La temojn ĝenerale kompletigas bibliogrfio. Ekzemple ĉe libro-konigo estas listigitaj recenzoj kaj en subsekcio referencoj al la verko.

Laŭteme estas listigitaj verkoj de Kalocsay, kiuj aperis en revuoj disŝutite. Sen registro multaj el ili dronus en la maron de literoj, aliaj restus por ĉiam perdiĝintaj, ĉar ili kaŝiĝas sub *nekonataj plumnomoj, litersignoj eĉ anonime.* La libro fermas ankaŭ tiun breĉon. Kaj kio estas same grava: laŭ tiuj listoj oni povas facile redakti pluajn Kalocsay-librojn.

Ĉe la redaktado mi klopodis kiel eble plej registri ĉiujn publikaĵojn PRI Kalocsay, tamen jam en la komenco mi devis rezigni pri la senmanka listigo. En la gazetoj certe kuŝas artikoloj, kiuj venis nek al miaj manoj, nek al tiuj de Kalocsay.

Mi ne hezitis -- el raraj, malaperintaj revuoj -- kelkfoje represigi fragmentojn el artikoloj de eminentaj aŭtoroj, se tiuj bonvenis al iu temo. Ankaŭ tiuj pecoj multe helpos interesiĝantojn iom pli funde studi ian laboron aŭ ideon de Kalocsay.

La aplikata dekuma sistemo de kvar subdividoj estas simpla kaj klara:

la unua cifero indikas ĉapitron (ekzemple 5 Ĉapitro 5);
la dua cifero montras subĉapitron (5.12);
la tria cifero rilatas al sekcio de ĉapitro (5.12.1);
la kvara cifero indikas subsekcion (5.12.1.0).

Tiu ĉi sistemo ebligas precizajn referencojn de unu parto al la alia. Tio estas des pli grava, ĉar pluraj aferoj estas traktitaj aŭ menciitaj en diversaj lokoj en ie pli detale ol en aliaj.Tiel oni facile trovos ĉion rilaton al la temo, kaj oni povas kompletigi iun ajn informojn. En la subsekcioj (referencoj) estas listigitaj verkoj, kiuj mallonge aŭ pretere okupiĝantaj pri la koncerna temo, entenas tamen rimarkindan penson, opinion.

Dum la laboro mi klopodis trarigardi la itineron *El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso.* Eminentaj verkistoj, amikoj kaj respektantoj de Kalocsay helpis min en tio.

Mi esperas, ke la legantoj akceptos tiun ĉi libron tiel ame, kiel ĝin kolektis, verkis kaj redaktis la kontribuantoj.

Budapest, 1998

Ada CSISZÁR

ANTAŬPAROLO
Al la dua volumo

Akompano de longa vivovojo de Kálmán Kalocsay kaj la listigo de lia giganta verkaro estas tiel grandampleksa, ke ĉe la finredaktado de OMAĜE... ŝajnis oportune aperigi la materialon po partoj. Tion ebligas ĝia laŭtema aranĝo, ĉar ĉiu tereno de la multflanka agado de Kalocsay konvenas kiel memstara libro.

Antaŭ unu jaro aperis la unua volumo en la vico, kiu ekde la deveno ĝis la lasta vivojaro -- helpe de 65 fotografaĵoj -- prezentas la homon Kalocsay, pri kiu -- escepte lian Esperanto-agadon -- oni scias malmulton.

La nuna volumo estas dediĉita al la originala Esperanto-poeto. La strukturo de tiu ĉi libro estas tute sama kiel tiu de la unua. Por gardi kontinuecon de la volumoj, la piednotoj estas numeritaj sinsekve sen interrompo.

Pri la enhavo de la unua kaj la sekvaj volumoj oni legas informojn sur la paĝoj 85-92. Pensante pri novaj esperantistoj sur la paĝo 98 troviĝas skizaj indikoj pri la verkoj de Kalocsay menciitaj ĉi-libre.

Mi ŝuldas koran dankon al la helpemaj kontribuantoj de tiu ĉi libro. Nome: al William Auld kaj Mauro Nervi, kiuj permesis represigi siajn poemojn, al Marjorie Boulton, Dáng Dính Dám, Shi Chengtai pro la transplantoj de Kalocsay-poemoj, al Osmo Buller, Reinhard Haupenthal kaj Géza Kurucz pro la grava helpo ĉe la nacilingve tradukitaj poemoj, kaj László Szilvási, kiu en la kompostado estis mia ĉefa helpanto.

Budapest, 1999

Ada CSISZÁR

ĈAPITRO 6
KALOCSAY KAJ LA HUNGARA LINGVO

6.1 AMO AL LA GEPATRA LINGVO

Se temas pri la lingvistika agado de KALOCSAY, prezentiĝas ankaŭ la demando; kiel li ligiĝis al sia gepatra lingvo?

Por fariĝi tradukartisto estas nepra la unua postulo: funde koni kaj ami la lingvon, kiun ĉiu homo suĉas en sin kvazaŭ kune kun la patrinlakto. Same okazis ĉe Kalocsay, kiu fervore okupiĝis pri la problemoj de la hungara lingvo.

Antaŭ ol lin delogis la Esperanta Muzo, li kultivadis hungaran poezion.

Lian ĝisfundan scion pri la gepatra lingvo brile atestas la verko RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN (Sistema Gramatiko de Esperanto), en kiu li koncize prezentas al hungarlingvanoj la gramatikajn regulojn laŭ la strukturo de PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO (verkita kun G. Waringhien). En tiu ĉi volumo Kalocsay eksplikas sian vidmanieron koncerne la gramatikajn konceptojn. Li kreis kelkajn novajn terminojn multe pli trafajn kaj klarajn ol la kutimaj esprimoj. Liaj klarigoj helpas ne nur la alproprigon de la internacia lingvo, sed ili ankaŭ firmiĝas la gepatran lingvoscion de la lernantoj.

En la revuo Esperanto (1966/84-87) li detala pritraktas la konstruon de la hungara lingvo kompare al la hindeŭropaj lingvoj. Ĉi tiu artikolo pruvas lian ĝisfundan scion pri la ĝenerala lingvistiko. Kalocsay intense okupiĝis pri la historio de la hungara lingvo. Li studis la malnovan hungaran lingvon kaj dialektojn. El sinonimoj li kolektis grandan stokon. Verŝajne li tial deziris tiel pasie, ke ankaŭ Esperanto havu la saman vortriĉecon. Kun ĝuo li kolektis kaj analizis eĉ la periferiajn esprimojn, la diversajn ĵargonojn. Ofte li amuzis siajn intimajn amikojn uzante la plej freŝajn Budapeŝtajn slangojn. Kelkajn ĵargonojn li enmetis en la kolekton DOMFABRIKO (verkita kun Ada Csiszár).

En la elformigo de la moderna hungara lingvo ludis decidan rolon la tiel nomata lingvorenovigo, lingvoriĉigo, kiun gvidis Ferenc Kazinczy (1759-1831). Pri tiu movado Kalocsay verkis artikolon en *Hungara Vivo* (1963:3, p. 4-5).Li fake, sed tamen kompreneble eksplikis la temon. Ĉi tiu studo estas interesa ankaŭ por esperantistoj, ĉar li komparas la agadon de la hungaraj lingvoriĉigantoj al la agado de neologismuloj en Esperanto.

Kalocsay en siaj hungarlingvaj verkoj laŭeble neglektis la superfluajn fremdajn vortojn. El liaj medicinaj verkoj radias la lingva pureco. Same en la ĉiutaga parolo li ambiciis uzi la ĝustajn kaj bongustajn esprimojn. Jam kiel juna kuracisto li eminentis ne nur en sia faka scio, sed ankaŭ per elokventa parolo. En la atestilo pri lia agado la iama hospitala ĉefo skribis:

"Sinjoro doktoro Kálmán Kalocsay havas stilon klaran, koncizan. Liaj prelegoj estas ĉiam precizaj kaj bildoriĉaj."

La hungarlingva verkaro de Kalocsay brile pruvas, ke li estis vera lingvo-scienculo, eĉ se tiujn agadojn ne ĉiuj pritraktis objektive. Estas fakto, ke lia panakira profesio estis medicino kaj ne lingvistiko, tamen li ne estis diletanto, sed amatoro en la plej nobla senco de la vorto, superante multajn meztalentajn lingvistojn.La eksterordinara intelekto, la lingvaj kaj lingvistikaj talentoj de Kalocsay promociis lin scienculo en sia amata gepatra lingvo.

D-ro Antonio TISZAMARTI
(Marcali, 1978)

6.2 FORVELKINTAJ FLOROJ

La literaturan agadon Kalocsay komencis per hungarlingvaj poemoj. Laŭ rakontoj de lernejaj kamaradoj li verkadis poemetojn jam dum la gimnaziaj jaroj.

Kiaj estis tiuj poemoj? Certe ne perfektaj. Post jaroj Kalocsay mem kondamnis ilin al forbruligo kaj per poemo diris adiaŭon al tiuj "verdaĵoj" verkitaj ĝis 1918:

Elfakult virágok (Paliĝintaj floroj) (32)

Az elmúlás szállott tirátok
Régi versek, préselt virágok.
Sok zörgő elfakult papírlap
Hová szállt rólatok az illat?
...

En ĉi tiu poemo Kalocsay komparas la riproĉindajn poemojn al odorperdintaj, sekigitaj floroj. Kelkajn li subskribis per pseŭdonimo: Ócsay Kálmán.

La unua periodo

Tri poemo (verkitaj en 1913, 1915, 1916) sub titolo *Három vers* (Tri poemoj) aperis en literatura revuo *Nyugat* (Okcidento) 1921:13-14, vol. II. p. 1289-1291. Paŭlo Balkányi rakontis, ke sen permeso de Kalocsay, li sendis la poemojn al la menciita revuo, sur kies paĝoj aperi estis kvazaŭ honorigo.Tiu sukceso ne spronis Kolomanon por kanti hungare, ĉar li jam fianciĝis kun la Esperanta Muzo.

El siaj hungarlingvaj poemoj Kalocsay poste esperantigis kvin pecojn. Du poemoj: *Ribeleto; En memorlibron de knabino* ricevis lokon en MONDO kaj KORO. Du aliaj: *Hararo via...* (en *Ahasvero X*); kaj *Ho amo, stulta aĵo* enhavas STREĈITA KORDO. La poemo *Mi amas vin* aperis en *Literatura Mondo* (1948/137) kaj en ORA DUOPO.

La dua periodo

Post longa paŭzo en 1928-1929 denove fontis hungarlingvaj poemoj el la plumo de Kalocsay. Estas enigmo, kiel li verkis dum du jaroj denove hungare. Ĉu li volis iom elsalti el la jugo de la Esperanta Muzo? Kiu scias? La ĉi-tempaj poemoj kompreneble estas jam pli maturaj ol la fruaj. Ili estas plejparte amaj poemoj dediĉitaj al la fianĉino poste edzino Margit Vangel.

Feliĉe post tiu ekskurso Kalocsay revenis al la Esperanta Muzo.

(32) Ĝi aperis en IN MEMORIAM (1994) p. 22-23.

La tria periodo

La hungarlingva poeto "perdiĝinta en Kalocsày" donis vivsignon post la dua mondmilito, kiam en la laborlokoj ekmodiĝis la "murgazetoj" redaktitaj kaj verkitaj de la dungistoj. Estis memkompreneble, ke d-ro Kalocsay, la Esperanto-poeto diris la dirindaĵojn, la aktualaĵojn en versoj. La ĉefa postulo de tiuj poemetoj kaj kantetoj (t.n. ĉastuska) estis la enhavo sen ia ajn literatura pretendemo, kaj ke ili iru facile en la orelojn kaj en la kapojn.

Kalocsay faris tiun taskon kvazaŭ ludante. Estas certe, ke la tiaspeca poemkovo amuzis lin, ĉar en la sama stilo -- ekskluzive por "hejma uzado"-- li verkis poemetojn pri la duonfilino kaj la nepino.

*

La postlasitaj hungarlingvaj poemoj ne sufiĉas por taksado: kiom da laŭroj estus Kalocsay rikoltinta, se li ne cedus al la forlogo de Esp-ERATO. L. Halka en 1936 faris demandon al Kalocsay:

-- Ĉu vi ne bedaŭras, ke vi ne fariĝis nacilingva verkisto?

-- *Mi ĉiam ŝparas al mi malfruajn bedaŭrojn* -- respondis Kalocsay.

Estas certe, ke al la konstruado de la Esperanta poezio la "ĉefpilastro" Kalocsay estis multe pli bezonata ol al la hungara literaturo.

Kalocsay ne fariĝis hungarlingva poeto, sed li neniam estis malfidela al la gepatra lingvo kaj ties poezio. Multajn perlojn de la hungara literaturo fare de lia interpreto ekkonis la mondo.

Lia vidvino rakontis, ke Kálmán du tagojn antaŭ sia morto kantis kaj deklamis hungarlingvajn poemojn, inter ili tiun de M. Csokonai Vitéz: *A reményhez* (Al la Espero).

Oni diras, ke ĝoji kaj plori oni povas nur en la gepatra lingvo.

Kalocsay per hungaraj poemoj adiaŭis de la poezio, de la mondo.

Földiekkel játszó... (A reményhez. Al la espero.)
De Mihály Csokonai Vitéz.

MairTpide. Kassovitz.

Andantó

Földiek-kel játszó Egi tüne-mény,
Kit teremt ma-gának A boldogta-lan,
Istenségnek látszó Csalfa vak remény,
S mint védangya-lának Bókol untalan.
Sima száddal mért kecsegtetsz, Mért nevetsz felém
Kétes kedvet mért csepegtetsz Még most is belém!
Csak maradj ma-gadnak, Biztatóm valál,
Hittem szép szavad-nak, Mégis megcsalál!



AL LA ESPERO

Ĉielmiraĝ', ludanta
kun la fil' de l' Ter:
ho vi, blinda, vanta
ŝajna di': Esper'!
Kiun kreas plore
ni en la danĝer',
Kredas klinhonore
esti gard-anĝel':
Kial venas vi glat-buŝe
kun sennuba rid',
kial ĉarmas vi flat-tuŝe
min per duba fid'?
Ĉesu! Vi posedis,
vi instigis min,
vi, dum mi vin kredis,
mistifikis min.
Plantis narcisgarbojn
vi en mia kort',
Per fontet' la arbojn
savis vi de mort',
vi printempon ŝutis:
florojn mil al mi,
ĝoj' ĉiela gutis
spice, pli kaj pli,
pensoj en la freŝa fruo,
kiel la abel',
flugis per la venta fluo
al la roz' miel'.
En feliĉo brila
jam ne mankis pli,
ol la kor' de Lilla,
kaj ĝin donis Di.

Sed ve, jen, ne verdas
miaj arboj plu,
rozoj freŝon perdas,
sekas fonto-flu',
mia helo Maja
iĝis vintra nub',
viv' antaŭa, gaja,
ĝis cindra rub'.
Ho, nur Lilla-n vi plu donus,
nur ŝin, ŝin en sol',
en lamentoj nun ne dronus
kanto sen konsol'.
En brakum' konsolojn,
trovi scius mi
kaj la perlokronojn
ne envius mi.
For, Espero flata,
for jam trompistin',
ja, ĉi krudo fata
enterigos min.
Mi ne plu aspiras,
la anim', pro l' lac',
je l' ĉiel' sopiras,
korp' je l' tomba pac'.
Por mi jam la kamp' ne floras,
ne odoras nun,
bosko trile ne sonoras,
nokten dronas sun'.
Sorĉaj sonoj trilaj,
bunta fantazi',
gaj', esperoj, Lilla-j,
adiaŭas mi.

ĈAPITRO 7

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO

7.1 LA "POETO DE POETOJ"

Hodiaŭ mi estas la sola vivanta atestanto de tiuj jaroj, kiam el la hungarlingva poeto Kalocsay fariĝis poeto de la internacia lingvo.

Kiam mi konatiĝis kun li (post la unua mondmilito), ni ambaŭ estis junaj, kaj unu el niaj ĉefaj temoj estis la amo. Mi, la ĉiama versamanto kun ĝuo legis la hungarlingvajn poemojn de Kálmán, kiujn li verkis junaĝe, parte dum la unua mondmilito.

En 1919 li jam voĉlegis al mi siajn versojn Esperantajn. Sur la paĝoj de la decembra numero de *Hungara Esperantisto* aperis unuan fojon liaj du originalaĵoj, nome la *Sonorilludo* kaj *Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito*. Laŭ posta informo de Kálmán, la *Sonorilludo* estis lia unua originala poemo verkita en Esperanto. Kunmetante la enhavon de MONDO kaj KORO, tiun poemon li metis sur la unuan paĝon. Tiu poemo tiel entuziasmigis min, ke poste mi ofte recitis ĝin al neesperantistoj, ĉar ĝi same pravigas la esprimkapablecon de nia lingvo, kiel la talenton de la verkisto:

...
Ho,svingu la langon
Vi tondre batanta!
Ho, plend' via granda
Traringu la landon!
Ho, plendu la fonton
de l' sango riproĉo!
Ho, tondru la voĉo,
Ke fendu la monton!
Estingu flamlangon.
....

Poste Baghy -- sur apartaj satiraj paĝoj de la februara numero de HE -- aperigis bonhumoran poemon sub titolo: *Monsonludo*, kiu laŭ la ekzemplo de *Sonorilludo* imitas la tintadon de la moneroj:

Demono de mono
ho son' monotono,
arĝenta kaj tenta
por pento sensenta,
kantanta lulanta!

En 1921 mi fondis la *Hungara Esperanto-Servo-n*, kiu eldonis propagandilojn, broŝuretojn kaj -- je mia sugesto -- aperigis la poemareton MONDO kaj KORO. Tiu ĉi kajereto donis esperon pri la estonta agado de Kalocsay. Tiuj esperoj ne estis trompaj. El liaj originalaĵoj kelkaj estis premiitaj en la *Internaciaj Floraj Ludoj*.

La apero de STREĈITA KORDO estis granda evento de la Esperanta poezio.Prave skribis Tárkony, ke ĝi meritas, ke oni lernu Esperanton por povi ĝin legi. La liriko de Kalocsay elvokis grandan interesiĝon kaj admiron pro la supera artismo kaj eksterordinara beleco.

La tria volumeto de la originalaj poemoj de Kalocsay estis RIMPORTRETOJ. Ĝi montras, kiel akran rigardon havis Kálmán. Li bonege pentris en la rondeloj la plej karakterizajn trajtojn de la tiatempaj "ŝteloj". Honorante min -- certe pro nia longa amikeco - ankaŭ mi enestas en tiu eminentula vico, kaj mi miras, ke li sciis pli multon pri mi, ol tiutempe mi mem.

En 1939 jam estis kunmetita nova poemaro IZOLO, sed pro la militaj jaroj ĝi perdiĝis. El tiuj poemoj kelkaj -- sub plumnomo Alex Kay -- aperis en *Literatura Mondo* kaj en la volumo ORA DUOPO.

Ne kalkulante la verse reverkitan EZOPA SAĜO, Kalocsay kiel originala poeto eksilentis, respektive foje-foje aperis liaj originalaĵoj en literaturaj revuoj. Tiujn poemojn oni devus kolekti en volumon(33).

Kion oni povas diri pri la poeziaĵo de Kalocsay jam ne diritajn fare de kompetentuloj?

Dum multaj jardekoj ĝuante la amikecon de Kálmán, mi ekkonis lian personecon, lian ideomondon kaj en liaj poemoj mi aŭdas resoni profunde humanan voĉon, ĉiujn sentojn de la homa koro.

Paŭlo BALKÁNYI
(Budapest, 1978)

(33) La KAL-ĈI Dokumentaro gardas la kserografitan, ringe binditan kolektaĵon sub titolo: DISSEMITAJ FLOROJ (1997).

La juna poeto
(1921)

SONORILLUDO

Vespere, en la kora, dolora monotono,
Subite, jen, eksonas la sonorila sono
Kun frapo ĝemanta,
Kun voĉo tremanta.
La batoj ekbruas, fenestron ekskuas
Kaj milde ekfluas muĝado la sorĉa.
Ho, son' sonorila, vi tondrosimila
Kaj tamen trankvila, ravanta kaj dolĉa!
Doloro en koro sveninte dronanta
Sufokas. Mi vokas al bronzo sonanta:

Ho svingu la langon
Vi tondre batanta!
Ho, plend' via granda
Traringu la landon!
Ho plendu la fonton
De l' sango riproĉo!
Ho, tondru la voĉo,
Ke fendu la monton!
Estingu flamlangon
De l' sent' malamanta,
De l' blinde flamanta
Volinta la sangon.
Atingu la kanto
La koran profundon
Por vindi la vundon
Sangitan pro vanto.
Ho serĉu la senton
Indulge lulante,
Kaj larmojn rulante
Eksolvu la penton!
Ho ringo de kantoj!
Vi fondu la rondon:
Vi fandu la mondon
En rond' de amantoj!

Kor' brulas, voĉ lulas, min levas, mallevas,
Pri l' flamo de l' amo flagranta mi revas:
Ke ruĝaj flamlangoj disflugas tra l' landoj,
Ekruĝas la vangoj en fratĉirkaŭpreno,
Kaj frate, en rondo solena, tra l' mondo
Ekmuĝas la ondo de l' kant' pri Kompreno...

Sed, ho ve, tremante,
Lastfoje ĝemante,

Kun mortadanta muĝo forsonas bronza sono,
Kaj kaptas min denove dolora monotono...

(1918)

7.3 MONDO KAJ KORO

Originalaj poemoj de K. Kalocsay(34)
Eldono de la aŭtoro
Budapest 1921.
11x15 cm, 32 p. Broŝ.

Represo en 1970.

Faksimila reeldono
A. E. Iltis, Saarbrücken 1981.

Ĉi tiu modesta kajero estas la unua poemareto de Kalocsay. La publiko akceptis ĝin favore.

"... Kiu legas la poemojn de MONDO kaj KORO -- diris en prelego H. Tonkin -- post la hezitaj provoj de pli fruaj poetoj, tiu tuj sentas la absolutan majstrecon de la poezia lingvaĵo, de la moviĝo de la lingvo, de la kaŝitaj ritmoj kaj asonancoj, kiuj kvazaŭ senpere, kvazaŭ hardite en jarcenta literatura tradicio eksonas..."

Vere, kelkaj el la poemoj -- precipe *Sonorilludo* -- jam atestas la poezian talenton de la debutanto, aliaj ankoraŭ portas sur si la signojn de senrutineco. En la poemo *Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito* (verkita en 1918) troviĝas rimoj riproĉeblaj ekzemple: ekmontras -- fulmotondras.

Kalocsay kritikis severe tiujn fruaĵojn. Lian ĉi-rilatan opinion gardas sonbendigita intervjuo fare de R. Haupenthal(35).

"... MONDO kaj KORO estas tute sensignifa libreto de komencanta esperantisto kaj ekzistas pluraj poemoj, kiujn jam siatempe, kiam aperis la STREĈITA KORDO, mi ellasis. Se mi tiam rifuzis rekoni tiujn poemojn kiel miajn, kial nun reeldoni tiujn verdajn verkojn -- ne en la esperanta senco, sed en la nematura senco verda..."

Kiam Kalocsay elektis poemojn al STREĈITA KORDO, kvar poemoj el MkK -- *Pri nia kor'; Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito; Knabino en fenestro; Feina sorto* -- ne ricevis indulgon. Ankaŭ la "rekonataj" poemoj akiris vivekziston en pli malpli tralaborita formo. Nur du poemoj: *Maldolĉa kanto* kaj *Aŭtuno* eniris per sensignifa modifo en la volumon.

Malgraŭ la supre citita juĝo de Kalocsay, en 1970 aperis foto-represo de MONDO kaj KORO. Kaj post 60 jaroj -- okaze de la 90-a naskiĝ-datreveno de Kalocsay -- nova represo: sur luksa papero en limigita eldono (100 ekzempleroj) ĉe A. E. Iltis. Ĉe tiu eldono iom ĝenas ke la kovrilo estas ŝanĝita. Ĝin dekoracias la sama portreto de Kalocsay, kiu tiun de PIMPORTRETOJ. Sed kiu scias? Eble por bibliofiloj la nova kovrilo pliigas la valoron de la noreto.

(34) La poemoj estas listigitaj en la ĉap. 7.11
(35) Aperigita en NP 1973:3, p. 131-140.

7.3.1 Esenca Bibliografio

B(aghy), J.: *Mondo kaj Koro.*
HE 1921:12, p. 11.
S(roele), G.: *Mondo kaj Koro.*
Esperanto 1922/28.
Minor, K.: *Mondo kaj Koro.*
E-P 1922:7-8, p. 159.
Haupenthal, R.:*La debuto: Mondo kaj Koro.*
LA KONTRIBUO p. 6-7.
Auld, W.: *Mondo kaj Koro.*
ENKONDUKO ĉap. III, p. 44-46.
Csiszár, A.:*Mondo kaj Koro.*
BI 1982:10, p. 13.

7.3.1.0 Notoj kaj referencoj

AD p. 156. K. Ĵikel.
EA/1, p. 16. W. Auld.
NP 1966:3, p. 136. L. Tárkony. En: *Kolomano Kalocsay.*
NP 1972:3, p. 132. R. Haupenthal. En: *"Esperanto estis mia nobla hobio".*
HV 1974:3, p. 4. W. Auld. En: *Skizo pri la evoluo de nia poezia lingvaĵo.*
Esperanto 1976/43. H. Tonkin. En: *Ni estu dankaj, ke Kalocsay vivis.*
En la 1-a volumo p. 45, 128.
Ĉi-libre p. 5, 13.

7.4 RIMPORTRETOJ

Galerio de Esperantaj Steloj
Pentris K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1931.
14.x 11 cm, 128 p. Ilustrita.

Premio de Universala Esperanto-Asocio.

La Esperanto-revuoj ofte citas la rondelformajn poemetojn, kiuj jen ironie, jen satire, sed ĉiam bonintence, kun ĉarma ludemo trafe karakterizas la prikantitajn "stelojn."

Jen la galerio:

J. Baghy, P. Balkányi, N .Barthelmess, A Behrendt, P. Bennemann, M. L. Blaise, V. Bleier, K. Bodó, O. Bujwid, H. J. Bulthuis, Th. Cart, A. Cseh, J. Dietterle, H. Dresen, E. K. Drezen, F. Ellersiek, J. Font-Giralt, J. Forge, J. Grau-Casas, S. Grenkamp-Kornfeld, E. Grosjen-Maupin, N. Hohlov, J. Isbrücker, H. Jakob, T. Jung, Kabe, I. Krestanov, E. Kreuz, Lanti, W. Lippmann, M. Lukáŝ, A. Mazzolini, J. Merchant, E. Mihalski, K. Minor, T. Morariu, N. V. Nekrasov, L. N. M. Newell, E. Osmond, Parvus Piscis, E. Privat, G. Ramboux, K. Robinson, R. de Saussure, J. van Schoor, R. Schwartz, H. Seppik P. Stojan, G. Stroele, K. R. C. Sturmer, F. Szilágyi, L. Totsche, G. Waringhien, E. Wüster, F. Zamenhof, Leono Zamenhof, Lidja Zamenhof.

Por la aŭtoro estis ĝena tasko verki memportreton:

Skribante pri mi la rondelon,
En embaras' mi sidis drone.
Ĉar -- kion skribi? Ĉu bastone
Tradraŝi mian propran felon?

Aŭ skribi pri mi bonon, belon
Flatante min mem fanfarone?
Skribante pri mi la rondelon,
En embaras' mi sidis drone.

Ĉu skribi ĉu ne? Ĉi ŝancelon
Amikoj rompis helpodone,
Ekrajdis la Pegazon sprone
Kaj min komandis sur ĉielon.

Skribante pri mi la rondelon.

La helpdonantoj estis du intimaj amikoj: L. Totsche kaj G. Waringhien.

LIX

Kalocsay, unika Nom'.
De l' versoj mastra suveren',
Ardante brila fenomen'
De nia povra idiom'.

Jen ŝtormas fajra vortciklon',
Jen muĝas milda versorgen',
Kalocsay unika Nom',
De versoj majstra suveren'.

Se ravas lin printemp-arom',
Se trafas lin la mond-ĉagren'
Ekvibras lia kor-anten'
En simfonia polikrom'...

Kalocsay -- unika Hom'!

L. Totsche.

LX

Kalocsay -- mondvoĉa bardo,
Reĝo de l' ritmo kaj de l' rimo,
Vi levas tra la land' sen limo
La verdajn faldojn de l' standardo.

Versforĝu do kun ŝtala hardo,
Leĝigu nin per artmaksimo,
Kalocsay -- mondvoĉa bardo,
Reĝo de l' ritmo kaj l' rimo.

Profunde via ferigardo
Penetris fundon de l' animo,
Sed hele brilas, kun esprimo
Fajra, profeta, via ardo...

Kalocsay -- mondvoĉa bardo.

G. Waringhien.

***

Kalocsay kalkulis je tio, ke ne ĉiu "stelo" estos kontenta per sia portreto:

Pardonon petas la poet',
Se ŝercon iu prenus moko
Pripensu ja, ke ne sur roko
Estas ĉizita ĉi portret'.

Facilsubtila rondelet'
Per vent' forflugas kiel floko.
Pardonon petas la poet'
Se ŝercon iu prenus moko.

Se tamen restus malkviet'
En koro, jen konsola voko:
Vin rekompencos postepoko
Per pri honora epitet'...

Pardonon petas la poet'.

7.4.1 Esenca bibliografio

Minor, K.: [] GE 1931:11, p. 171.
S(troele), G.: Esperanto 1931/45.
Butin, M.: [] HdE 1931:42, p. 3.
Sturmer, K.R.C.: LM 1931/180.
Newell, L.N.M.: TBE 1932, febr. (322), p. 133.
Tárkony, L.: PAĜO p. 80-82.
Szilágyi, F.: ESk 1951:16, p. 3.
Auld, W.: ENKONDUKO ĉap. III, p. 54.

7.4.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU p. 16.
Aŭstria Esperantisto 1932:4, p. 40. Ld. Siedel.
EdE p. 466. G.S(troele).
SKIZO p. 32. V. Novobilský.
KE 1932:nov.-dec. (188-189), p. 170.
KPr p. 62. D. Kralj.
OD p. 105. L. Tárkony.
NP 1966:3, p. 136. L. Tárkony.
En la 1-a volumo p. 93, 129.
Ĉi-libre p. 5, 8, 23, 25.



7.5. STREĈITA KORDO
Originalaj poemoj de K. Kalocsay(36)
Literatura Mondo, Budapest, 1931.
20x13 cm, 189 p. bind. kaj broŝ.

Dek elektitaj poemoj.
Hungara Esperanto-Asocio
Budapest, 1976, HEA-rota
15x12 cm, broŝ.

Faksimila represo
A.E. Iltis, Saarbrücken, 1978.

La poemaron STREĈITA KORDO oni konsideras kiel mejloŝtonon en la Esperanta poezio.

Streĉita kordo! Ĝojo kaj lamento
Vibrigis vin. Sed ili al la brust'
Delonge fremdas kaj indiferento
Kordo, vi longe kuŝis en silento,
Jam eble vi eĉ raŭkas pro la rust'...
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.
(La unua strofo de la titoldona poemo)

„...Okazis io ankoraŭ ne ekzistante en nia lingvo kaj literaturo, okazis io nova: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi, poezia lingvo: poemlibro, kies apero apertas novan horizontojn por nia literaturo: la epoko de la diletantismo definitive dronis en la pasinton. La apero de STREĈITA KORDO estos unu el la plej gravaj datoj de nia literaturo..." – skiribis L. Totsche en *Literatura Mondo* (1932/14-16, 31-33).

La opinion de Kalocsay pri sia poemaro gardas sonbendigita intervjuo farita de R. Haupenthal. La konversacio en presita formo aperis en Norda Prismo (1972, n-ro 3, p. 131-140) sub titolo: *„Esperanto estis mia nobla hobio."* Dum la konversacio diris Kalocsay: „...Se oni reeldonus STREĈITA KORDO, por tio mi havas nenian kontraŭcen, ĉar ĝi estis siatempe jam sufiĉe cenzurita de mi, kaj kvankam mi ne karesus nun ame ĉiun poemon, kiu enestas, tamen, mi opinias, ke mi ne devas honti pri tiuj poemoj, kion mi ne povus diri pri ĉiuj poemoj de la MONDO kaj KORO..."

La poemojn de MONDO kaj KORO Kalocsay pli-malpli tralaborita formo envenigis en STREĈITA KORDO. Kvar poemoj: *Pri nia kor', Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito, Knabino en fenestro, Fejna sorto* estis ellasitaj.

La poemaro dividiĝas en sep ciklojn: *Eĥo de forta voko; La enfalinta mino; Aglo kaj kolombo; Korprintempo; Vizaĝoj kaj pejzaĝoj; Ahaŝvero de amo; Ebria ekvatoro.*

La unua ciklo entenas esperantismajn poemojn: kongresajn salutojn, funebrajn kantojn pri la morto de Grabowski kaj Th. Cart. Tiujn „verdajn" poemojn oni ofte deklamis en Esperantaj kunvenoj.

La dua ciklo prezentas ĝojon kaj melankolion en 16 eroj. Vivjesado kaj spleno de la juneco kaprice eĥas en la versoj.

La poemojn de la tria ciklo *Aglo kaj kolombo* trateksas la amo, deca amoro:

Kaj kisoj! Trink' Edena!...
Min nokte sonĝo bena
Per dolĉa tromp' enlulas,
Ke lip' sur lipo brulas.
Nokt' benas, tag' min mokas,
Mi taĝe vane vokas
Vin kun dolor' pasia,
Ho kara mia!
(El *Amkanto*)

La ciklo *Korprintempo* havas poemojn pri nova, freŝa ĝojo. Ĝia ĉefa peco estas la *Maja idilio*, al kiu Kalocsay kaj M. Sárossy komponis melodiojn.

En la kvina ciklo *Vizaĝoj kaj pejzaĝoj* oni legas poemojn plej diverstemajn verkitajn en 1920-1923. La ciklo entenas naŭ sonetojn al kiuj kvin estas muzikigitaj fare de S. Urban, F. Merrick kaj M. Sárossy.

XXII Kantoj formas unu poemon de la sesa ciklo *Ahaŝvero de amo*. Ĝi rakontas la historion de la unua, arda amo, kiu post la enuo kaj malvarmiĝo el plezuro fariĝas sufero.

En la prologpoemo de la ciklo diras la heroo:

Nun ekparolas la hero'
De l' versoj pekaj kaj lamentaj,
Ne estas mi kaj li identaj,
Neniu kredu do!
...

Malgraŭ tiuj versoj kelkaj supozis, ke la heroo de poemrakonto estas mem Kalocsay.

Pri la diversstilaj poemoj de la lasta ciklo *Ebria ekvatoro* skribas Totsche (PAĜO p. 75):

„Tiu ĉi ciklo atingis tian altan gradon de l' poeta esprimpovo, tian filozofan profundon de l' sublima Penso, ke ĝi levas la poeton el la kadro de unu literaturo. Tiuj ĉi poemoj estas ne nur la perloj de la Esperanta poezio, ili viciĝas al tiuj, en kiuj la genioj de l' homaro priesploris la esencon kaj destinon de Homo kaj Mondo..."

El la poemvolumoj de Kalocsay certe STREĈITA KORDO ricevis la plej altan rekonon de literatoroj kaj plej bonan akcepton ĉe la legantoj.

(36) La poemoj estas listigitaj en ĉap. 7.11

7.5.1 Esenca bibliografio

Newell, L. N. M.: *Kolomano Kalocsay: Streĉita Kordo.*.
LM 1931/177.
S(troele) G.: *Streĉita Kordo.*
Esperanto 1931/144.
Minor, K.: *Kalocsay, K.: Streĉita Kordo.*
GE 1931:10, (428), 154-155.
Newell, L.N.M: *Streĉita Kordo. Originalaj poemoj de K.alocsay.*
TBE 1932:jan. (321), p. 123.
Totsche, L.: *Streĉita Kordo.*
LM 1932/14-16, 31 , 33; repr. en PAĜO p.79.
Miĥalski, E.:*"Poeto de l' Streĉita Kordo".*
AD p. 69-78.
Szilágyi, F.: *Streĉita Kordo.*
OL p. 164.
Kralj, D.: *Streĉita Kordo.*
KPr p. 53-62.
Tonkin, H.: En: *Kelkaj pensoj pri Kalocsay.*
NLR sepa jaro, 38, p. 58-63.
Tárkony, L.: En: *Tra nia Prismo: Kolomano Kalocsay.*
NP 1966:3, p. 135-36; repr. en OD p. 104-105.
Benczik, V.:*Streĉita Kordo.*
BI 1976:8, p. 7.
Sauerbrey, H.: *Streĉita Kordo.*
Paco 1978 (GDR eldono), p. 34.
Haupenthal, R.: *La bilanco: Streĉita Kordo.*
LA KONTRIBUO p. 7-8.
Csiszár, A.: *Streĉita Kordo. Originalaj poemoj de Kalocsay.*
BI 1979:2, p. 6.
Sola, M.: *Mesaĝo pri amo kaj homo.*
HdE 1979:4-5, (1645-1646), p. 8.
Auld, W.: *Streĉita Kordo.*
ENKONDUKO ĉap. III, p. 44-45.

7.5.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU p. 14.
Aŭstria Esperantisto 1932:4, p. 40. Ld. Siedel.
□KE 1932:jul.-aŭg. (184-185), p. 142.
□Informoj de E-Asocio de Estonio 1932:11-12, (129-130), p. 75.
ESk 1951:16, p. 1. R. Rossetti.
ESEOJ I. p. 84-85. G. Waringhien
SKIZO p. 32. V. Novobilský.
LE 1958:6-7-8, p. 70. M. Boulton.
NLR 6. 1960:32, p. 68-7. En: *Kien la elizio?*. H. Vatré.
GVIDLIBRO II. p. 116.
HV 1976:6, p. 15. A. H.
BrE 1978:jul.-aŭg. (830), p. 262-263. K. Long.
VORT-STATISTIKAJ ESPLOROJ. Saarbrücken: Iltis 1986. 41 p. (p. 6, 21-24, 31, 33, 35-36, 39). H. Vatré.
En la 1-a volumo p. 80, 93, 129.
Ĉi-libre p. 2,-5, 8, 19, 23, 25.

***

Okaze de UK en Montpellier (1998) EVA metis antaŭ siajn membrojn la demandon:
"Kiuj 10 originalaj Esperanto-libroj laŭ vi, estas plej legindaj?"
Laŭ la "voĉdonado" STREĈITA KORDO estas inter tiuj 10.

***

7.6 SEKRETAJ SONETOJ

Sonetoj de Peter Peneter.
Sub sep sigeloj.
Ilustraĵoj de STEBA(37)
14 x 11 cm, 95 p.

Reeldono en la vol. LIBRO de AMO
Je la ŝildanonco de "L' Akacio".
Byblos MCMLXIX(38)

Tria eldono en la serio: *Esperantaj Klasikaĵoj*, n-ro 4.
Postparolo de W. Auld.
Ilustraĵoj de M. Schwimmer.
Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989.
21 x 14 cm, 104 p.

Fragmentoj en Interreto.

Peter Peneter dediĉis la verkon jene:

Al gefianĉoj kaj junaj geedzoj por instruo kaj instigo.

Ĉar temas pri seksaĵo, la aŭtoro kalkulante pri pruduloj, enkonduke avertas la legantojn por eviti eventualan nervoŝokon:

Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda,
Se indignas vin la bolo
De la temperamento suda,
Se ĝenas vian delikaton
La grimaceto am-aluda,
Pripensu bone antaŭ la lego:
Tute ne estas mi altruda,
Forĵetu min, retiru vin
Al via dika ŝel' testuda.

Krom tiuj versoj la leganto ricevas dufoje admonon. Sekvas *Abundaj motoj* t.e. citaĵoj de diversaj aŭtoroj pri la amo. Kelkajn esperantigis K. Kalocsay.

(37) Burĝa nomo: Stefano Barta (Budapest). La ilustraĵojn gardas la KAL-ĈI Dokumentaro.
(38) Falsa dato. Ĝi finpretiĝis en decembro 1964 kaj aperis en 1965.

Pri la 52 sonetoj:

La protaganisto estas la poeto mem. En hejma balo li renkontiĝas kun blondulino. Reciproka enamiĝo. Sekvos rendevuoj, kisoj, kisegoj, ĉiam pliaj kaj pliaj alproksimiĝoj de la korpoj ĝis atingo de la kulmino en la seksa ĝuo sendepende de hazarda loko.

La dolĉan fortikaĵon per siego
Mi prenis kampe, inter timian',
Sur fojno, nuda tero kaj en neĝo,

Malantaŭ pordo kaj post la ekran',
En lito kaj sur sofo kaj sur seĝo
Kaj sur tapiŝo sub fortepian'.

En la XXIV-a soneto la poeto proponas geedzecon.

Amata! Venu al la pastro:
Ni iĝu jam laŭleĝa par'!
Tro longa estis la prokrasto,
Amata! Venu al altar'!

*

La sekvaj sonetoj rakontas la geedzan vivon (kun ĉiuj intimaĵoj), pri la gravediĝo de la edzino kaj prikantas amon post la forpaso de arda korpdeziro.

La historion kompletigas *Komplezaj klarigoj* pri la senco de neoficialigitaj -- inter ili vulgaraj -- vortoj. La libron ilustras 14 primitivaj desegnaĵoj.

***

Ne troviĝas libro en Esperantio, kion ĉrkaŭas tiom da sekretoj kiel ĉi tiujn *Sonetojn*.Ĝian situacion trafe difinis D.H. en Heroldo de Esperanto (1961:11, (140), p. 4.):

"Antaŭ proksimume 33 jaroj, libreto cirkulis retiriĝeme, honte, kvazaŭ mezepoka leprulo, ĉiam timanta senkompatan ŝtonumon far preterpasantoj..."

Vere, la libro diskrete prisilentas sian devenon: mankas naskiĝjaro, naskiĝloko, nomo de la eldonisto, eldonnombro, prezo, kaj la generanton kamuflas pseŭdonimo Peter Peneter.

*

La nuntempa generacio certe miras: kial oni vindis la "bebon" en densa nebulo? Por kompreni la aferon oni devas observi la tiutempajn moralojn. La seksa kunigo estis tabutemo. La literatura pritrakto de tiuj "malĉastaj" temoj kiel pornografiaĵoj estis "delikto oficiale persekutenda".

K. Fajszi en 1978 faris sonbendigitan intervjuon kun la eksedzino de V. Bleier, kiu parolis ankaŭ pri la eldonagado de *Literatura Mondo*:

"...Foje venis al ni Kalocsay kaj montris al Vilmos la manuskripton de SEKRETAJ SONETOJ. Ili priparolis ĝian aperigon, kvankam ili sciis, ke la verkado kaj eldono de tiaspecaj literaturoj estis tre aŭdaea kaj riska entrepreno.Kompreneble la nomon de la aŭtoro kaj ankaŭ tiun de la eldonisto ne eblis indiki en la libro..."

Vere, se iu malfermis la libron -- sen scio de Esperanto -- povis el la ilustraĵoj konstati pri kio temas. Tiutempe la gazetoj ne riskis recenzi la libron kaj oni vendis ĝin kaŝite dum la 24-a UK en 1932.

La SEKRETAJ SONETOJ vekis scivolemon: kiu estas la aŭtoro de tiu ĉi unika libro? Oni diras, ke ne ekzistas krimo sen denunca spuro. Literatoroj esploris, kiu el la Esperanto-poetoj kapablas verki laŭ ritmo kaj rimo tian virtuozan sonetaron. La spuroj kondukis al Budapeŝto, al *Literatura Mondo*, al K. Kalocsay. La suspekton apogis, ke en la sama jaro aperis la PARNASA GVIDLIBRO (ene ankaŭ penetera vortaro) kaj en la traduko de Kalocsay LA TAGLIBRO kaj la ROMAJ ELEGIOJ de Goethe, kies stila simileco estas frapa, ĝiajn ilustraĵojn desegnis same STEBA.

Ne nur literatoroj, sed ankaŭ iom pli erudiciaj legantoj konjektis, ke la aŭtoro de la *Sonetoj* estas Kalocsay. S-ino G.F. el Berlin (1933) skribis:

"Kara Doktoro Kalocsay, neniam ekkaptis min erotika verketo tiom, kiel ĉi tiu libro, kiun mi aĉetis dum la kongreso en Parizo. Longe mi ne povis diveni, kiu estas la aŭtoro de la ĉarmaj sonetoj, sed hodiaŭ mi legis vian poemvolumon STREĈITA KORDO, kiu faris antaŭ mi nedubinda vian personon, kiu kapablas por tia alta poeziaĵo kiel la *Sonetoj...*"

*

Kiam aperis la SEKRETAJ SONETOJ la erotika poezio ankoraŭ ne enhejmigis en la Esperanta literaturo, ne montris tian naturalan pritrakton de la seksaĵo, kiun oni povas trovi en la greka-latina, franca aŭ itala literaturoj. La *Sonetoj* vekis indignon eĉ en verkistaj rondoj. Pri tio informas leterkopio de Kalocsay (mankas dato) adresita al K.R.C. Sturmer:

"...Pri Peter Peneter. Kiel mi scias, Totsche atakis vin ne pro via neplaĉo (pri gustoj...), sed pro via indignego,inda al kvakero, sed ne atendebla de vi, laŭ la skriboj de via amiko Kenelm. Cetere, vi mem skribis ie, ke prudemo kaj "ĉastemulemo" kuniras kun certa grado de anim-malsano. Estas eble, ke mi ne memoras bone, sed tio estas vere, eĉ se vi ne skribis..."

Poste K.R.C. Sturmer reviziis sian opinion, pri kio informas alia leterkopio de Kalocsay:

"Kara K.R.C.!

Via opinŝanĝo pri Peter Peneter kompreneble estas por li tre granda ĝojo, ĉar post via ekstreme kondamna sinteno li jam opiniis sin mem tute fia porko, kio ne estas, verŝajne, tro agrabla sento. Kaj nun li sentas la plej grandan dankon al tiu sinjoro de vortaro fama, kiu per konfeso de similaj spertoj, pruvas al li, ke ne estas honto prikanti plezurojn, kiujn de Adamo kaj Eva oni konas kiel eble plej absorbajn, plej intimajn kaj ekzaltajn donacojn de l' vivo. Kaj ne estas honto, ke oni portas homajn artojn en krudaj naturfunkcioj spite ekkriante: *Nur la fuŝulo fikas kiel taŭro!...*"

***

Malgraŭ, ke la SEKRETAJ SONETOJ vendiĝis kaŝite, la stoko baldaŭ elĉerpiĝis. Antaŭ la dua mondmilito cirkuladis tajpitaj kopioj, sed poste oni renkontis kserografiitajn pirataĵojn. En *Esperanto* (1965/178) jam oni legas anonceton pri ĝia fotorepreso. Amantoj de la erotika poezio povis akiri la sopiritan sonetaron en bela aspekto, kiam ĝi reaperis en la LIBRO de AMO. La volumo -- krom la SEKRETAJ SONETOJ -- enhavas pluajn erotikajn poemojn, inter ili la TRAVESTIITA MUZO-n de Georgo Peterido Peneter (t.e. G. Waringhien), kiu konfesas sin filo de Peter Peneter.

G. Waringhien skribis al Kalocsay (1957.06.03):

"Mi ĵus ricevis leteron de Régulo. En ĝi li levas la demandon, kiun mi devas debati kun vi; li intencas eldoni (sen nomo de firmo nek la simbolo) ampleksan erosan libron, en kiu li kunigus la Sekretajn Sonetojn, la Travestiitan Muzon kaj novan poemareton Senmaske de la sama aŭtoro: alidirite, ĉiujn verkojn de la familio Peneter. Li kompreneble ne volus fari tion sen konsento de Peter Peneter kaj, ĉar vi ŝajnas esti lia plej proksima kunulo, mi transmetas al vi la demandon."

Mankas respondletero de Kalocsay, sed ili certe venis al konsento, ĉar la 29-an de oktobro 1964 raportis Waringhien:

"Kara Amiko. La presado de Sekretaj Sonetoj finiĝis, jam komenciĝis tiu de la verketo de lia filo; ĉio estas sur tre bela papero, per tre novaj tipoj kaj ĝis nun (almenaŭ ŝajnas al mi) sen preseraroj. La tuta volumo estos vera juvelo, mi kredas."

*

Cetere la volumon vartis Arieh ben Guni (t.e. G. Waringhien), kiu en la *Antaŭparolo* prezentas sin kiel spicvendiston en Parizo.

*

Pri la mistera Peter Peneter:

R. Haupenthal interparolis kun Kalocsay (NP 1972:3, p. 131-140). Temis ankaŭ pri Peter Peneter kaj SEKRETAJ SONETOJ. Kalocsay neis, ke li kaj Peneter estas la sama persono kaj aldonis, ke li bone konis Penetern, kiu loĝis en Budapeŝto kaj mortis en 1953.Jen kontraŭdiro de Georgo Peterido Peneter, kiu en la prologo de sia erotika poemaro LA TRAVESTIITA MUZO (aperinta en 1950!!!) skribas:"Post la eterna bedaŭrinda malapero de mia patro Peter Peneter en la ombrojn de la *dua mondmilito*..."

Aldo de' Giorgi skribas en privata letero:

"Kvankam Kalocsay ĉiam neis esti aŭtoro de tiu sonetaro priskribanta la amon kaj amoron en ĉiuj facetoj kaj realigmanieroj (tamen neniam obscene), la engaĝitaj beletroamantoj kaj esperantologoj neniam kredis al la ekzisto de tiu fantomo Peneter kaj havis neniam dubon pri la vera patreco de la verko. Sed laŭ mia modesta opinio, por definitiva verdikto pri la plumdeveno sufiĉas atente legi la libron. Kaj ne estas necese tro profunda filologia komparado por malkovri, ke tiu majstroverko povis fonti nur el Kalocsay.La stilaj, morfologiaj, leksikaj similecoj estas vere tro multaj. Mi sentime deklaras, ke neniu alia aŭtoro, eĉ ne la plej lerta epigono lia , estus povinta verki tiun libron."

*

Ĉar Kalocsay neniam rekonis la aŭtorecon de la *Sonetoj*, skrupulaj literatoroj deziras absolutan pruvon antaŭ ol eldiri verdikton.

G.E. Maura (t.e. G. Waringhien) en sie libro DUONVOĈE (1963), p. 111, aludas pri iam senmaskigo de Peneter:

Bela Petro, bela masko!
Mi malkovros vin je Pask' aŭ
je via Pentekosto!

Kaj li fakte faris la demaskigon sur la malantaŭa klapo de la polvoŝirmilo de PLENA ANALIZA GRAMATIKO de ESPERANTO (1980):

"...Ili (t.e. Kalocsay kaj Waringhien) kunlaboris por produkti -- pseŭdonime -- la erotikan poemaron LIBRO de AMO..."

*

En la postparolo de la tria eldono de SEKRETAJ SONETOJ W. Auld pritraktas la lingvan signifon de tiu ĉi pionira verko kaj vicigas faritajn analizojn pri la identeco de la mistera Peter Peneter kaj K. Kalocsay.

Flanke de Kalocsay estas komprenebla, ke tiutempe kaj ankaŭ poste li neis la aŭtorecon de la ŝokiga verko (kial porti sur si la brulstampon: *pornografo?*, sed hodiaŭ, kiam ĉion inundas la sekseco -- oni povas konfesi pri lia "neleĝa infano"

7.6.1 Esenca bibliografio

Kralj, D.: *Sekretaj Sonetoj.*
KPr p. 91-92.
Borsboom, E.: *Spriteco, rafinita erudicio.*
HdE 1965:11, (1401), p. 4.
Borsboom, E.: *Rimarkinda verko "Libro de amo".*
Nederlanda Esperantisto 1965:jul.-aŭg. p. 63-64.
Thorsen, P.: *Honi soit qui mal y pense.*
NP 1965:4-6, p. 169-170.
Auld, W.: *Limoj de l' amoro.*
MK 1966:15, (Printempo), p. 158-160.
Ueyama masao: *Sekretaj Sonetoj.*
L' Omnibuso 1968:jul.-aŭg. (4), p.10-11.
Duc-Goninaz, M.:*Sur la marĝenoj de Sekretaj Sonetoj.*
NP 2970:4, 265-273.
Haupenthal, R.: En: *"Esperanto estis mia nobla hobio"*
(Intervjuo kun K. Kalocsay).
NP 72:3, p. 131-140); Repr. en: DU INTERVJUOJ.
Interparoloj kun K. Kalocsay kaj W. Auld.
Saarbrücken: Iltis 1979. 28 p. (p. 5-16).
Haupenthal, R.: *La dua morto de Peter Peneter.*
Horizonto 1976:3, p. 56-57.
Haupenthal, R.: *La apokrifoj: Sekretaj Sonetoj.*
LA KONTRIBUO p. 10-11.
Lister, D.: *Libro de amo de Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter.*
BrE 1979:jul.-aŭg. (830), p. 262.
Auld, W.: *Sekretaj Sonetoj.*
ENKONDUKO ĉap. III., p. 56-58
Csiszár, A. : SENVUALE. (Pri la pseŭdonimoj de K. Kalocsay). Budapest:
KAL-ĈI Dokumentaro 1999. 25 p. (p.7-8, 10-11).

7.6.1.0 Notoj kaj referencoj

NLR 6.1960:32, p. 69-71. En: *Kien la elizio.* H. Vatré.
TBE 1965:jun. (713), p. 127. W. Auld.
TBE 1965:sept. (715), p. 167-168. En: *Hazardo kaj elekto.* J. Régulo.
Esperanto 1966/3-4. W. Auld.
LE 1966:1-2, p.12. E. Vilborg.
EL LA VIVO DE BERVALA SENTAŬGULO.
La Laguna: J. Régulo 1974, 136 p. (p. 14-16). L.Beaucaire.
EdE p. 486.
GVIDLIBRO II. 2-a eld. p. 171-172.
La Kancerkliniko 1982:24, p. 15 B. Golden.
KAJ LA CETER' p. 29, 75. G. Waringhien.
NE NUR... p. 31. M. Boulton.
VORT-STATISTIKAJ ESPLOROJ. Saarbrücken: Iltis 1986. 41 p. (p. 39). H. Vatré.
LF 1988:12, p. 4. En: *La poezia verkaro de Gaston Waringhien.* M. Duc-Goninaz.
Velo 1986:3-4, p. 16-17; repr. en Starto 1990:4, (139), p. 12-13. B. Golden.
La Gazeto 1987:8, p. 12-13. *En: Juan Régulo-Pérez en Hamburgo.*
HV 1987:5, p. 189-191. B. Golden.
LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO p. 70. (vd ĉap. 7.9).
HV 1990:1, p.24.
Fonto 1990:112, p. 5-7 En: *Tabu-esprimoj.* P. Thorsen.
Esti Hirlap (Vespera Gazeto) 1990.07.24.
IF 1993:1, p. 3-4. En: *La mito-kreanto Régulo.* R. Haupenthal.
DJE 1995:2, p.13-14. (La soneto 10. kun klarigoj germane kaj slovake).
La Gazeto 1999:84, p,10. Ed Borsboom.
Ĉi-libre p. 28, 30.



7.7 IZOLO
Originalaj poemoj de K. Kalocsay(39).

Budapest: Literatura Mondo 1939.
22x18 cm, 79 p.

Faksimila represo laŭ la kompostita,
sed neaperinta eldono.

Universala Esperanto-Asocio.
Rotterdam,1977.

En la Antaŭparolo W. Auld rakontas la historion de la libro:

"En 1939, la "sepdeksepa libro eldonita de Literatura Mondo" devis esti *Izolo,* la unua poemaro de Kalocsay post *Streĉita Kordo* kaj *Rimportretoj* (1931). La volumo estis presita; sed ĝi neniam estis bindita, ĉar komenciĝis la Dua Mondmilito..."

En 1947 Reto Rossetti vizitis ĉe Kalocsay kaj li rakontis, kiel saviĝis la poemaro:

"...Mi tede petegis 5 ekzemplerojn ĝis fine li konsentis kaj gvidis min al kaduka barako, kie la oktavoj kuŝis disŝutite sur la tera planko. Mi zorge kolektis kvin kajerojn, kiuj do fariĝis la solaj postrestintaj ekzempleroj en la mondo." (Esperanto 1976:marto, p. 46)

*

La kvin ekzemplero, kiujn savis de pereo Reto Rossetti, ebligis la aperigon de la poemaro.

La libro dividiĝas en kvar ciklojn: *Verdstele* (primovadaj poemoj); *Malnovaj madrigaloj; Sur la monto Nebo; Japaneskoj.*

Kelkaj poemoj kaj 16 japaneskoj ĉi-volume aperis la unuan fojon. Por literatoroj certe estos interesa kompari la modifitajn versojn kaj ŝangitajn titolojn de kelkaj madrigaloj.

Viajn okulojn/Alkemio; Kiel en griz' de l' tagoj.../Festoj;
Kiel la peza gut' miela/Pli ol amo

Dank' al Reto Rossetti kaj UEA, IZOLO trovis vojon al la legantoj.La unikaĵon de la volumeto pliigas, ke ĝi estas la unua libro de Kalocsay aperinta postmorte.

(39) La poemoj estas listigitaj en la ĉap. 7.11

7.7.1 Esenca bibliografio

Tonkin, H.: En *Kelkaj pensoj pri Kalocsay.*
NLR sepa jaro, 38, p. 58-63.
Haupenthal, R.: *La mutiĝo. Izolo.*
LA KONTRIBUO p. 8-9.
Rossetti, R.: *Kalocsay, la kolosa diletanto -- Okaze de la reeldono de la Kaloĉaja "Izolo".*
Esperanto 1978/134-135.
Ross, N.: *Izolo.*
LF 1978:50, p.18.
Cool, J. F.: *Klasika kolekto.*
HdE 1978:5-6, (1629-1630), p. 8.
Schulze, K.: *Izolo, poemaro de Kalocsay.*
derE 1978:6, (92), p. 23.
Benczik, V.: *"Izolo" represita.*
HV 1978:3, p. 115.
N. N.: *Reaperis la "perdita" poemaro de Kalocsay.*
BI 1978:5, p.5; represo en Fervojisto (Nederlando) 1978:7, p. 7.
Salvesen, N.T.R.: *Izolo de Kalocsay.*
BrE 1978:sept.-okt. (825), p.173-174.
Dunn, F.: *Izolo de K. Kalocsay.*
The Aŭstralian Esperantist 1978:okt.-nov., p. 188-189.
Auld, W.: *Izolo.*
ENKONDUKO ĉap. III. p. 54-56.

7.7.1.0 Notoj kaj referencoj

NP 1972:3, p. 132. En: *"Esperanto estis mia nobla hobio".* R. Haupenthal.
Paco 1977: (Hungara eldono), p. 15. A. Csiszár.
Esperanto 1978:5, p.1o1. *IZOLO -- el izolo al la publiko.*
Esperanto 1978:6, sur posta kovrilpaĝo.
BI 1984:1, p. 8. G. Mihalkov.
En la 1-a volumo p.93, 127.
Ĉi-libre p. 6.



7.8 EZOPA SAĜO
77 fabloj, verse reverkitaj[40]
K. Kalocsay.
29 satiraj vinjetoj de B. Hamberg.
Kopenhago: Komuna Konversacia Klubo.
1956. 21x13 cm, 127 p.

Faksimila represo,
Saarbrücken: A. E. Iltis 1978.

Ĉinigita de Lu Jiambo.
Siĉuana Popola Eldonejo, 1980.

En Interreto.

La unua postmilita libro de Kalocsay

La *Revuo Esperanto-Internacia* (1955:598, p. 259-261) faris demandojn al Kalocsay, kiu diris inter aliaj:

"Mi tradukis 77 fablojn el Ezopo. Mi kredas, ke aperintaj en libro ili farus kelkan ĝojon al niaj infanoj grandaj kaj malgrandaj: vere estas apenaŭ kompreneble, ke Ezopo ĝis nun mankis en Esperanto."

La versigita fablaro trovis afablan akcepton ĉe la versamanta legantaro tiom pli, ĉar post la apero de STREĈITA KORDO kaj RIMPORTRETOJ (1931) ne venis poemaro de Kalocsay.

Krom la 77 fabloj troviĝas en la libro 15 paĝaj senrimaj versoj, kiuj rakontas la legendan vivon de Ezopo. Pri tiu ĉi greka klasikulo -- vivante en la VI-a jarcento antaŭ nia erao -- postrestis nur tre magraj indikoj. Jen kiel pentras lin Kalocsay.

Ezopo! Ĉu li estis, aŭ ne estis?
Oni rakontas... oni... svaga oni...
Li, tamen, eĉ se ne vivis, vivas.
Se Hellas lin ne naskis, ĝi lin kreis,

Oni rakontas, ke li, Friga sklavo,
estis platnaza, nanstatura, lama,
ŝvelventra knabo, kaj krom tio muta.
...

Tiun ĉi "biografion" kompletigas *Rimarkoj* kaj *Notoj* de Kalocsay.

La ĉefrolantoj de la rakontoj plejparte estas bestoj kun homaj karakteroj, prezentante moralojn. Ekzemple la *Leona divido* reflekse elvokas la proverbon: *Kie forto, tie potenco; Kiu havas forton, havas rajton; Kie regas la forto, la rajto silentas.* Jen:

Foje la lupo kaj la vulpo kaj la kat'
kun la leono sin federis por ĉasad'.
Grandkorpan cervon predis la ĉasanta kvar',
kaj la leono lin dividis per deklar':
"Leono mi estas: Mia la unua part'.
Plej forte mi estas: Mia do la dua part'.
La trian rajtas mi: La plej kuraĝa best',
Kaj ve al tiu, kiu tuŝas al la rest'!"

En aliaj fabloj la moralo estas duaranga celo.Tiuj rakontoj servas unuavice kiel amuziloj:

Inter du virinoj

Delogis tre matura damo
mezaĝan viron, kiun amo
de junulino same ravis,
kaj tiuj du virinoj havis
tre grandan zorgon por lin ligi
kaj ĉiel al si konformigi.
La harojn ili al li flegis,
kaj nia viro feliĉegis
revivi siajn tempojn junajn.
Nu, sed la dam' la harojn brunajn,
kaj la knabin' la harojn grizajn
elŝiris al la olda knabo,
ĝis fine, dank' al la flegoj frizaj,
Jen estis li kun kalva kapo.

La brile versigitaj ĉarmaj fabloj -- pli ol io ajn laŭdoj -- parolas por si mem. La satiraj skizaj vinjetoj trafe ilustras la fablojn.

Resume: oni povas konsenti kun W.R. Roelofs, kiu en sia recenzo konkludis:

"La versoj de tiuj fabloj estas ĝenerale bonaj kaj simplaj, tiel, ke ili taŭgas ankaŭ por tiuj, kiuj suferas de poezifobio."

***

Erling Windeballe (Danio) aĉetis la manuskripton de EZOPA SAĜO en aŭkcio aranĝita por helpi hungarajn esperantistojn, kiuj suferis perdojn dum la revolucio en 1956.

(40) La fabloj estas listigitaj en la ĉap. 7.11

7.8.1 Esenca bibliografio

Waringhien, G.: *Ezopa Saĝo.*
NLR 2. 1956:2, p. 76-80; ampleksigita en KAJ LA CETER' p. 93-101.
Groth, M.: *La Ezopa Saĝo -- Internacia.*
NP 1956:4-5, p. 211-212.
Halbedl, A.: *Ezopa Saĝo.*
Paco 1956:34-35, (Ĉeĥoslovaka eldono), p. 17-18.
Jung, T.: *Ezopa Ŝaĝo.*
□ HdE !956;12, (1236), p. 8.
Rossetti, R.: *Ezopa Saĝo.*
Esperanto 1956/158.
Vilá, F.: *Ezopa Saĝo.*
Boletin 1957:febr. (98), p. 18.
R(oelofs), W.F.: *Ezopa Saĝo.*
Scienca Revuo 1958:4, (36). p. 158.
Thorsen, P.: *Rimarkoj al la recenzo de A. Halbedl.*
Belarto 1958:1, p. 64.
Honfan: *Ezopa Saĝo.*
EPĈ 1959:4, p. 142.
Kralj, D.:*Ezopa Saĝo -- 77 fabloj.*
KPr p. 122-123.
Middelkoop, A. F-ino.: *Ezopa Saĝo.*
NE 1961:marto, p. 21.
Csiszár, A.:*La represita Ezopa Saĝo.*
BI 1978:7-8, p. 4.
Ragnarsson, B.: *Bonvena reeldo.*
HdE 1978:10, (1634), p. 4.
Benczik, V.: *Fabloj eternaj.*
HV 1979:2, p. 76.

7.8.1.0 Notoj kaj referencoj

NAER 1957:jan.-febr. (1), p. 3. D.B. Richardson.
NP 1965:3, p. 90-92. (Pri la ilustraĵoj de B. Hamberg).
En la 1-a vol. p. 51, 127.
Ĉi-libre p. 6.



7.9 LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO

Originala verko en Esperanto.

Prefaco de G. Waringhien.
Glosoj de G. Silfer.
Grafiko de P. Martinelli.
Bildoj de G. Tallisi.

Kooperativo de Literatura Foiro.
Prilly (Lausanne), Svislando, 1990.
21x15 cm, 131 p. Ilustrita.

Erotika ĉefverko de la Esperanta literaruro.

Tiun ĉi libron tro multaj opinius naŭzige erotika kaj ofende blasfema -- skribas Waringhien en la *Prefaco.*

Vere, la verko estas konsiderebla kiel la SATANAJ POEMOJ de Salman Rushdie(41).

En certa letero (1964.10.29) adresita al Kalocsay, oni legas:
"Kia domaĝo, ke P.P. ne postlasis unu filinon por kompletigi la trion!"
Jes, Peneter-filino ne naskiĝis, sed por venigi sunlumon la satanan historion, anoncis sin Peter Peterido Peneter.

***

LA SATANA HISTORIO

La libro konsistas el du partoj:

La eksmonaĥino estas dekdu-kanta poemo. Ĝi konsistas el 824 versoj. Temas pri erotikeco, mistereco, certe ne verkita por bazlernejanoj. La poemo -- per sia brila versarto -- estas multe pri bravura ol la SEKRETAJ SONETOJ.

La dektria nokto estas notlibro de Emiano Imby. Ankaŭ en tiu proza parto abundas la erotikeco, mistereco. Ĝi ligiĝas al la poemo. En la rakonto estas lerte plektitaj konversacioj pri Esperanto.

En la poemo enkonduke Pipinjo, la eksmonaĥino konfesas pri si mem:

"Kiel do en la klostro?" Ho, volis la destino,
ke post orfiĝo plena mi iĝu monaĥino.
Sed mi jam baldaŭ sentis, ke nedireble frostaj
kaj mornaj kaj premegaj estas la muroj klostraj.

Min tedo sufokadis. Mi brulis de sopiro,
kaj iutage el mi eskapis ĝema diro:
"Mi elsekiĝos kiel riveret' en sablo!
Ho, se min amus viro, ĉu homo, ĉu diablo."

Aperis tuj kaj saltis kaj sternis min Satano.
Mi preskaŭ dispremiĝis kiel tretita flano.
Mi sentis min disflui en plena neniiĝo;
sed tiu sento estis la plejo de feliĉo.

Tiel mi iniciĝis. Kaj nun la malanĝelo
min vizitadis nokton post nokt' en mia ĉelo,
min amis kaj amuzis, timinda kaj tenera,
jen, estis li alterne ĉiela kaj infera.

Li min instruis arte pri ĉiu am-aromo,
kaj diris, ke ĉi artojn li lernis en Sodomo,
ĉar ĉion ĉi ja homoj kaj ne diablo kreis.
Kaj li rakontis al mi, kiel la urb' pereis."

*

Okazis tiutempe, ke la sodomanoj komencis seksfreneze konduti. Ili praktikis ĉiujn perversiojn: seksa ĝuo inter gefratoj, kuniĝo kun propraj infanoj, kun bestoj, seksvolupto pere de kadavroj, ktp. Kaj ĉion ĉi publike!

Jehova ĉiun ĉi rigardis kun granda rido, sed vere li enviis la sodomanojn pro tiuj ĝuoj, sed baldaŭ venis al Jehovo du anĝeloj burokratoj:

"Sinjoro, -- ili diris -- plej granda embaraso
en matrikuloj regas pri ĉi damninda raso!

Ni diros tuj ekzemplon, juĝu pri ties gravo:
Knabino ĵus koncipis de sia propra avo.
Jen, ŝia ido iĝos pro tiu generĵonglo
frato de ŝia patro, do ŝia fil' kaj onklo.

Sed patrin-onklo estas praonklo, do la povra
koncipaĵo estos praonklo sia propra.
Ili tro elbridiĝis, necesas jam retroo!"
Jehov' pripensis, diris: "Jes, troo estas troo!"

Jehovo devis fari ion por sia bona famo. Do li pereigis la urbon Sodomo.

*

La ***Dekunua kanto*** rakontas, kiel finis Satano la amrilaton kun Pipinjo.

Li ekparolis jene: "Mi diras kun bedaŭro,
ke tiu ĉi renkonto jam estas adiaŭo.
Kaj kredu, min Pipinjo, mi diras tre malĝoje:
Knabinon mi vizitas ne pli ol dekdufoje.

Ĉar la dektria fojo jam estus tre danĝera,
eĉ povus esti murda por via korpo tera."

...

Post la adiaŭo de Satano, Pipinjo forlasis la klostron:

Vere, post la disiĝo mi havis lacofebron,
poste dum unu jaro mi tenis amfunebron,
sed fine mi al viroj rifuĝis el la spleno,
ĉar manke da ĉevalo bonvenas eĉ azeno.

La "azeno" estis Emiano. Post la dekdua nokto Pipinjo forlasis lin, same kiel ŝin forlasis Satano. Jen la lamentado de de Emiano:

Skribante ĉi rakonton de aŭtentika vero,
ah, ofte mi sopiras jam kuŝi sub la tero.
Surkore al mi estu ormedaliono,
al animkolektistoj ĝi servu por rekono.

Ili min portos tiel al Kampo de Volupto,
al la Sodomo Nova, por sorĉa lud' kaj lukto.
Pipinjo min forlasis, sed ja Pipinjoj nuraj
atendas sube por ĝuoj senmezuraj.

Ho ve, Pipinjo! Tamen ŝi estis senkompara,
kun inferbrulo sorĉa, kun ĉielmildo kara!
Ŝi venos iam suben, kaj dum la amaj vagoj
ni trovos nin, kaj kun ŝi min fandos dekdu tagoj!

Ankoraŭ dekdu tagoj! Ankoraŭ sorĉa sorbo
de la plezur' magia el ŝia dolĉa korpo!
Poste, se ŝi jam ĉesos min stringi per fermuroj,
ĉieloj frakasiĝu, disfalu infermuroj.

*

La dektria nokto komenciĝas per renkontiĝo de du amikoj esperantistoj: Peter Peneter kaj Emiano Imby. Ili konversacias pri la Esperanta Literaturo pri SEKRETAJ SONETOJ, pri la longa poemo de Emiano Imby: *La eksmonaĥino.* Emiano rimarkas:

"Stranga estas tiu poemo nenie eldonebla. Oriente pri sia mistikeco, okcidente pro sia blasfemo, ambaŭloke pro sia obsceneco."

Helpe de Esperanto, Emiano (post 25 jaroj) retrovas Pipinjon, kiu vivis/as kiel nimfomania virino, kaj ĉe ĉiuj novaj seksrilatoj ŝi ŝanĝis sian nomon:

Miminjo, Pipinjo, Zizinjo (verŝajne li komencis kiel Bibinjo). Intertempe ŝi edziniĝis (la edzo estas Urnasto Brusse, UEA delegito) kaj naskis infanojn. Tamen ŝi estas ankoraŭ juneca, freŝa kun la iama ĉarmo kaj sorĉo. Tiun nevelkintecon certe ŝi ricevis donace de Satano.

Emiano kaj Pipinjo rekomencas la iaman ekstazan amrilaton. Emiano notas siajn travivaĵojn en taglibron. La unua noto estas datita la 5-an de julio. En la ampaŭzoj ili konversacias pri artoj, pri la Esperanta literaturo, citas poemojn, kantojn, mencias eminentulojn: Baghy, Cseh, Waringhien, Sárossi, Schulhof, Kalocsay, Régulo, Auld, Rossetti, Francis, Tárkony, Maura, Dinwoodie, Beaufront, ktp.

La lasta noto en la tagkajero okazis la 24-an de aŭgusto.

*

Peter Peneter en Postparolo kompletigas la strangan historion: Emiano subite mortis, ĉar laŭ la satana leĝo la 13-a nuptonokto estas jam mortiga, krome li ne estis jam juna. Baldaŭ mortis ankaŭ Pipinjo pro ia nekonata, sensimptoma malsano. Satano punis Pipinjon pro tio ke ŝi rekomencis la amrilaton kun sia unua elektito.

*

Poste la amiko P.P. konstruigis belegan kripton en gotika stilo kaj -- laŭ la deziro de Pipinjo -- metigis la du korpojn en la saman ĉerkon. Do en la ***Kampo de Senfina Volupto*** ili eterne estos kune.

Pri LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO oni povas senhezite diri:

EL PORNOGRAFIO KRISTALIĜINTA PURA POEZIO.

La satana historio pli ol jardeko dormis en la KAL-ĈI Dokumentaro. A. Csiszár plenumis la deziron de Kalocsay laŭ la surskribo de la Imby-dosiero:

Aperigebla nur 13 jarojn post mia morto!!!

***

(41)
Salman Rushdie, fama angla verkisto (li naskiĝis en Bombay) ekde 1989 vivas en mortdanĝero, ĉar Ruhollah Khomeini ajatollah anoncis premion (du milionoj da dolaro) por lia kapo. Laŭ la iama fanatika gvidanto de la islama religio, la SATANAJ POEMOJ de Rushdie profunde ofendas la islamon. la Profeton Mahometo kaj la Koranon. Kvankam la irana reĝistaro en 1998 aboliciis la verdikton, tamen fanatikaj muzulmanoj ne pardonas: la "fatva" ankaŭ plu validas: Do Salman Rushdie eĉ hodiaŭ vivas en la ombro de la morto.

7.9.1 Esenca bibliografio

Haupenthal, R.: *La dua morto de Peter Peneter.*
Horizonto 1976:3, p. 56-57; repr. en DU INTERVJUOJ. Interparoloj kun K. Kalocsay kaj W. Auld. Saarbrücken: Iltis 1979. 28 p. (p. 15-16).

Csiszár, A.: *Postlasitaj verkoj de Kaloccsay.*
LF 1983:79, p. 10-14 (p. 13).

Csiszár, A.: *Erotika ĉefverko de nia literaturo.*
LF 1986/1987:100, p. 25-26.

En: *Juan Régulo-Pérez en Hamburgo.*
La Gazato 1987:8, p.13.

Waringhien, G.: *Enkonduko por "La dekdu noktoj de Satano".*
LF 1989:117, p. 6-9; poste kiel *Prefaco* en la libro.

Auld, W. □BrE 1990:nov.-dec. p. 93-94.

Giorgi, A. de': *Skua evento*
HdE 1991:1, (1836), p. 4.

Major, J.: *La dekdu noktoj de Satano.*
NZE 1991:aprilo, (505), p. 7-8.

Cash, R.: *Ĉu seksobsedo aŭ sinmoko?*
Esperanto 1991/142; repr. en: Eventoj 2/aprilo 1992 (004), p. 7.

Haupenthal, R.: *Marĝene de... La dekdu noktoj de Satano.*
IF 1991:3, p. 75-77.

Kamaĉo, G.: *La dek du kanto de Emiano.*
IF 1991:3, p. 78-79.

Thorsen, P.: *Por Fajngustumuloj.*
Internaj Informoj (Dana E-Asocio) 1991:aprilo, p. 2.



7.10 VERSOJN ONI NE AĈETAS

Postlasitaj poemoj de K. Kalocsay(42)
Kun studoj de A. Csiszár kaj G. Silfer.

Editoris A. Csiszár.
Antaŭparolo de H. Mayer.

Vieno: Pro Esperanto 1992
16 x 14 cm, 64 p.

Eldonita okaze de la centra datreveno de la naskiĝo de Kálmán Kalocsay.

Tiuj ĉi poemoj (verkitaj en 1931-1945) dum jardekoj dormis en la paperĝangalo de Kalocsay. Se li estus vivanta, certe ne ĉiu poemo estus venigita en la volumon sen polurado.Probable la prizorganto de lia postlasaĵo aspiris, ke ĉiuj versoj (eĉ la ne diamantaj) estu eternigitaj.Cetere en la mondliteraturo ne unufoje okazas, ke oni publikigas ankaŭ malpli valorajn verkojn de iu fama verkisto forpasinta.

La unua parto de la volumo enhavas esperantismajn, "verdstelajn" poemojn.
La titoldona poemo *Versojn oni ne aĉetas* (verkita en 1931) estas ironia konstato pri la poemfobio de la verda popolo:

Ĉu libera vers', aŭ stanco,
Blanka vers', aŭ rimokulto,
Pura rim', aŭ asonanco;
Ĉiu ĉie ĝin ripetas:
Versojn oni ne aĉetas.

...

Esperanto stamporingon,
Ŝelkon, citron kaj kravaton,
Tason, vazon, razoklingon,
Stelfiguran pudingpaton,
Medalionon kaj bonbonon,
Mirindaĵojn plej diversajn,
Verdstelitan pantalonon,
Ĉiujn jes! Sed librojn versajn?
Monon oni ne elĵetes:
Versojn oni ne aĉetas.

Iom pli malice samopinias Alex Kay en la *Arto poetika*:

Vendiĝas la romanoj, kvazaŭ pano,
sur versojn -- kraĉas la samideano.

Sekvas ses poem-dediĉoj skribitaj en la INFERO (1933). Inter ili plej interesa estas la dediĉo *Al Julio Baghy:*

Sendante ĉi volumon al Julio
  Baghy, mi timas, ke ĝin en la mano
  li ĵetos grumble, kun melankolio,
kaj anatemos li pri Kolomano
  Kalocsay pro l' vortmanio aĉa,
  infektanta la lingvon per malsano.
Kaj eble vidus li kun sento plaĉa,
  se pendus mi pro l' krimoj, vekriante,
  el Lucifera buŝo sangokraĉa.
Jen tamen, kiun mi tridekkvar-kante
  postkantis laŭ la vizio nigra,
  kiun konsterne diris al ni Dante;
dum sekvis mi, senlace kaj senpigre,
  sur penaj krutoj de la Loko Dura,
  mian Poeton en la vojo migra,
kaj malgraŭ ĉiu stumblo, tremo krura,
  al steloj, kiuj surĉiele tendas,
  mi kun li venis el la Val' Terura:
jen, kia ajn akcepto ĝin atendas,
  ĉu tret' malŝata, ĉu rekona ĝojo,
mi ĝin amike dediĉante sendas
  vojaĝdonacon el *"Danĝera Vojo"*.

En tiuj versoj Kalocsay aludas al la artikolserio de Baghy; kiu sub titolo *"Danĝera vojo"* (Oomoto Internacia 1933) atakas la neologismon kaj ties ĉefan reprezentanton Kalocsay. Por faciligi la komprenon de la poem-dediĉo A. Csiszár en eseo donas koncizan klarigon pri la tiama neolog-milito.

Sub titolo *Itala triptiko* G. Silfer komentarias la dediĉojn : *Al Gino Catarzi; Al Stefano La Colla* kaj *Al Bruno Migliorini,* kiuj helpis aperigon de la INFERO.

Ses japaneskoj, du malnovaj madrigaloj, tri sonetoj kaj kvar poemoj el la militaj jaroj (1939-1945) vicigas en la volumo.

En la Antaŭparolo skribas H. Mayer:

"Teneraj madrigaloj, amaraj japaneskoj, senhelpa balbutado antaŭ la milita hororo... ne esence modifas nian bildon de la poeto Kalocsay, sed donas al ĝi lastajn konturojn."

Eta SZIGETI-KARDOS

(42) La poemoj estas listigitaj en la ĉap. 7.11

7.10.1 Bibliografio

Thorsen, P.: *Klasika skermo en du onoj.*
LF 1992:139, p. 269-270.
Verloren van Themaat, W.: *Versojn oni ne aĉetas.*
Fenomeno 1993:junio
En la 1-a vol. p. 74, 77, 82, 129.

KELKAJ RIMARKOJ AL LA POEMLISTO

Listiganta la poemojn de Kalocsay -- por praktika uzebleco -- ŝajnis plej oportuna la alfabeta ordigo de poemtitoloj sen konsidero sciencajn kriteriojn de la bibliografiado, ĉar tiu ĉi kunmeto ne pretiĝis por tia difinita celo. La ĉefa klopodo estis la senmanka listigo de liaj originalaĵoj kaj preciza informado pri la unuopaj poemoj.

Estas konata fakto, ke Kalocsay ofte reviziis, ĉizis siajn versojn, kaj kelkfoje li modifis ankaŭ la poemtitolojn. Tiuj variantoj estas apartigitaj per oblikvaj strekoj. La unua loko staras titoloj probable pli konataj, ekz.: *Ezopa fabelo/Fablo*; *Alkemio/Viajn okulojn*, ktp. Piednotoj, referencoj, literoj en krampoj indikas sciindaĵojn pri unuopaj poemoj: *postlasaĵo; premiita; muzikigita; tradukita al nacia lingvo;* ktp.

La aper-datoj estas laŭeble en kronologiaj sinsekvoj apartigitaj unu de la alia per punktokomo. Krom la registritaj aper-lokoj certe troviĝas pliaj, kiuj venis nek al miaj manoj nek al tiuj de Kalocsay.

La uzitaj mallongigoj, multnombraj sigloj, certe ne estas amuza legaĵo, sed ili estos utilaj al esploremuloj, kiuj deziras kompari la variantojn.

7.11 ORIGINALAJ ESPERANTO-POEMOJ[43]

Adiaŭo
OD p. 149.
(Pl) ***Adiaŭo*** (Epilogo).
IZOLO p. 77.
(j) ***Admono***
NB 1963:2, Suplemento; AD p. 12.
(Pl) (j) ***Adoro***
IZOLO p. 74.
Aglo kaj kolombo
MkK p.27-28; SK p. 67.
Ahasvero de amo
Ĉu tie mi mem parolas
SK p. 142.
Nun ekparolas la hero'
SK p. 143; ĉi-libre p.14. (Fragmento).

I. ***Sonĝon mi vidis***
SK p. 144-145.
II. ***Ni la tranĉilojn de l' sopir'***
SK p. 145-146
III. ***Kaj tamen***
SK p. 146.
IV. ***Printempo la arbojn***
SK p. 147.
V. ***Jen sidas ŝi***
SK p. 147-149; EA/1, p. 126-128; KREMO p. 15-16; EA/2, p. 154-155.
VI. ***Ho, ŝanĝis sin la firmament'***
SK p. 149.
VII. ***Ravente, pompe, sorĉe kaj danĝere***
SK p. 150-151; EA/1, p. 128-130; EA/2, p. 155-156.
VIII. ***Ho amo: stulta aĵo***
SK p. 151; vd p. 2.
IX. ***Mi, Foli'***
SK p. 152.
X. ***Hararo via***
SK p. 153; vd p. 2.
XI. ***Ho, feliĉuloj***
SK p. 154-155; EA/1, p. 130-134; KPr p. 60-61; KREMO p. 16-17; TBE 1972:febr. (779), p. 178-179; EA/2, p. 157-158. (P. Dakoviĉ komentarias la poemon en Literatura Foiro 1977:169, p. 255-259); vd ĉap. 7.13
XII. ***La viv' ne estas vivo***
SK p. 156-157.
XIII. ***Mi estas perfidanto de altaro***
SK p. 157.
XIV. ***Doloras al okul' la lumo***
SK p. 157-158.
XV. ***Sepmejla bot', sepmejla bot'***
SK p. 158-159.

XVI. ***Ho, rememor'!***
SK p. 159-160.
XVII. ***Mi iris for, mi iris for***
SK p. 160.
XVIII ***La sento de soleco min atakas***
SK p.161-162.
XIX. ***Vagulo migras sur la vojo***
SK p. 162-163.
XX. ***Mi pekis, punu, kara***
SK p. 163.
XXI. ***Konsolu min***
SK p. 164.
XXII. ***Ĉiu malnova zorg'***
SK p. 164-165.
Nun la hero' paroli ĉesas
SK p. 166.
Al Applebaum (Dankesprima versaĵo por la ricevita pakaĵo dum la hungara revolucio en 1956).
TBE 1957:jul.-aŭg. (626), p. 103; BrE 1987:jul. (877), p. 281; DF p. 35.
(Pl) ***Al Bruno Migliorini*** (Poezia dediĉo en la INFERO).
HdE 1978:3, (1627), p. 3; VERSOJN p. 22; vd p. 32.
(Pl) ***Al Helmi kaj Hilda Dresen*** (Poezia dediĉo en la INFERO).
VERSOJN p. 19.
(Pl) ***Al Julio Baghy*** (Poezia dediĉo en la INFERO).
VERSOJN p. 20; vd p. 32.
Al kaptita amiko (Al G. Waringhien).
NLR 1. 1955:1, p.3; OD p. 144; Horizonto 1976:3, p. 55 ; KAJ LA CETER' p. 23.
Alkemio/Viajn okulojn
LM 1948/138;ESk 1951:16, p. 8 ;OD p. 124-125;KREMO p. 21;HdE 1971:15,(1514), p. 3
□ Paco 1976 (GDR eldono), p. 20; IZOLO p. 32; vd p. 23; ĉap. 7.13
Al knabino, kiu nur balbutas Esperanton
LM 1924/201; SK p. 124.
Al soneto
OD p. 141.
Al Marjorie Boulton -- sur la marĝenon de ŝia libro "Kontralte"
NLR 1. 1956:4, , p. 123-124; DF p. 28.
Al neŭtraluloj
IK 1947:13-14, p. 15; LA KONTRIBUO p. 10; DF p. 23.
(Pl) ***Al Stefano La Colla*** (Poezia dediĉo en la INFERO).
l'Esperanto 1987:12, p. 10; VERSOJN p. 17; vd p. 32.
Amkanto (Kun muziknotoj)
LM 1932/179; SK p. 75; ĉi-libre p. 14. (Fragmento); VkM p. 3; vd ĉap. 7.12
Am' ne estas/La amo
MkK p. 24; E-P 1921:11, p. 173; □ KE 1922:marto, p. 45;1932:nov-dec. (188-189), p.166; SK p. 76; AD 2-a vol. p. 214; OL p. 164; vd ĉap. 7.13
Amoro kaj frenezo
ES p. 105; HFM 1960:4, p. 59.
Antaŭparolo de Phaedrus
ES p. 26.

(j) ***Aŭgusta nokto*** (A. Kay).
LM 1938/5; IZOLO p. 66; NĜ p. 37; vd ĉap. 7.13
Aŭtuna fantazio
MkK p. 32; SK p. 116.
Aŭtuna parko
OD p. 148; HdE 1966:14, (1423), p. 1; 1981:14, (1689), p. 1; EĈM p. 37; vd ĉap. 7.13.
Aŭtuno
MkK p. 31; SK p. 109; NP 1966:3, p. 132; UTAM p. 32; VkM p.5; E-aboco p. 175; vd p. 8; ĉap. 7.12; 7.13
Azena hufbato
ES p. 54.
Azena ruzo
ES p. 90.
Balado (en PGv).
PGv p. 2; KE 1984:240, decembro; BI 1986:2, p. 9; EĈM p. 45; vd ĉap. 7.13
Balado (Pri la rido trila).
LM 1925/61; SK p. 98-99.
Balado pri la atombombo
LM 1947/9; KREMO p. 22; vd ĉap. 7.13
Batalo de Franclando
OD p. 143; FE 1976:apr.-majo, (298), p. 39.
Batalo de Londono
OD p. 144; Paco 1975, (Hungara eldono), p. 15.
(Pl) (j) ***Batalo por la vivo***
IZOLO p. 71.
Bela programo
SK p. 54-55.
Bombtapiŝo
LM 1949/41; OD p. 146
Bronza faŭno sur la forno
EA/1, p. 145; OD p. 142; TELLIM p. 341; EA/2, p. 168-169; vd ĉap. 7.13
Brulpereo
MkK p. 19-20; SK p. 77-78.
Centjara estus jam la koro
Esperanto 1959/16; NB 1959:10, p.41; LE 1959:11-12, p. 98; Bulteno (HEK) 1959:11-12, p.155; MZ p 32; DPr p.115-116; HFM 1986:4, p. 49; 1991:1, p. 3; HI 1991:7; titolpaĝe; EPVT p. 120, DF p.36; vd ĉap. 7.13.
<u>*Cinikaj sonetoj*</u> (Alex Kay).
(Pl) ***Prologo***
IZOLO p. 56.
I. ***Vi estas homfrato!***
LM 1935/166; OD p. 134-135; KREMO p. 20; IZOLO p. 57.
II. ***Ho hom' de l' temp'/epok' pasinta***
LM 1935/166; OD p. 135; IZOLO p. 57-58.
III. ***La homon belo spronis***
LM 1935/166; OD p. 135-136; IZOLO p. 58.
IV. ***Sed nun -- jen sklav' post sklavo***
LM 1935/166; OD p. 136; IZOLO p. 59.

V. ***La homo de Futuro***
LM 1935/166; OD p. 136-137; IZOLO p. 59-60.
VI. ***Ho kara samtempano***
LM 1935/166; OD p. 137; KREMO p. 20; IZOLO p. 60.
(Pl) ***Epilogo***
IZOLO p. 61.
Ĉirkaŭpreno
SK p. 94.
Ĉu vi sentis
LM 1925/93; DF p. 8.
(Pl) (j) ***Danĝero***
IZOLO p. 74.
Danko
LM 1948/139; OD p. 126; vd ĉap. 7.13.
Danko (En: EZOPA SAĜO)
ES p. 93; Bona Espero 1975:jan. (1), p. 13; 1975:dec. (4), p. 10; NP 1956:4-5, p. 145; EPVT p. 104; vd ĉap. 7.13.
(Pl) ***Debato***
IZOLO p. 24-26.
(Pl) ***Dediĉo al Gino Catarzi*** (Poezia dediĉo en la INFERO).
VERSOJN p. 18; vd p. 32.
(Pl) (j) ***Degelo***
IZOLO p. 73.
De Kolomano al Gaston/Al Gaston Waringhien (Dediĉo en la INFERO).
Horizonto 1976:3, p. 55; KAJ LA CETER' p. 17; VERSOJN p. 21; Penseo 1992:22, p. 1;
Demande
SK p. 175; Fonto 1999:220, p. 5.
Demando
LM 1926/5; SK p. 68-69.
(Pl) (j) ***Demando***
IZOLO p. 70.
Demando stranga
LM 1949/41; DF p. 16.
Diboĉe(44)
SK p. 171-172; EA/1, p. 134-136; EA/2, p. 159-160; vd ĉap. 7.13
Disciplino
LM 1947/117; DF p. 21.
(j) ***Disĉiplo*** (A. Kay).
LM 1938/5; IZOLO p. 69.
Dolora saluto (Al la Hungara Landa Kongreso en Miskolc en 1922).
HE 1922:9, p. 6-7; SK p. 24-26.
Donaco
LM 1926/5; SK p. 71.
Duopa psalmo
VS 1929:2, p. 51; SK p. 101; OD p. 116-117.

Duope(45)
SK p. 189; AD 2-a vol. p. 220-221; EA/1, p. 142-143; NP 1961:4, p.100; EA/2, p. 166-167.
Du virinoj
LM 1948/139; OD p. 126-127.
(Pl) (j) ***Ebrio***
IZOLO p. 74.
Efereme
LM 1925/38-39; SK p. 178-182.
Ekstaze (C.E.R.Burny).
LM 1924/19; SK p. 169-170; AD 2-a vol. p. 219-220.
El la sama buŝo
ES p. 94
En amara horo
SK p. 33-35; EA/1, p. 117-120; BLK p. 86-88; EA/2, p. 146-148; NEK p. 413-415; Fonto 1999:220, p. 3-5; en Interreto.
En ĉi murdepoko
LM 1949/41; ESk 1951:16, p. 8; EA/1, p. 156; OD p. 146; TELLIM p. 342; KREMO p.28;
TBE 1972:dec. (789), p. 392; HV 1975:1, p. 17; BLK p. 92; EA/2, p. 178-179; EĈM p. 29; Fonto 1996:189, p. 21; vd ĉap. 7.13.
En la memorlibron de knabino
MkK p. 23; □KE 1922:3, p. 45; KONATIĜU p. 14; SK p. 125; EĈM p. 83; VkM p.8; vd p. 2; ĉap. 7.12; 7.13
(Pl) ***En mond' konfuza***
IZOLO p. 64.
Engels(*)
IK 1947:6-7, p. 15; E-S 1951:10, p. 139; derE 1970:42, titolpaĝe; Fonto 1983:151, p. 14; DF p. 22.
En solo/sol'...
LM 1925/69; SK p. 58; AD 2-a vol. p. 215; KPr p. 56-57; OD p. 113.
(Pl) ***Esperanto,1938***
IZOLO p. 20-21; NEK p. 385-386.
Eŭkaristia
UNU EŬKARISTIA ESPERANTO-MONDKUNVENO. Budapest 1938, broŝ.; Katolika Stelo 1938:6-7, p. 1; Ekat 1976:5, p. 66-67; DF p. 13; vd en la 1-a vol. p. 54.
Ezopa fablo/Fabelo
VS 1929:3, p. 106; SK p. 122-123; AD 2-a vol. p. 216-217; E-S 1951:10, p. 141; ESk 1951: 16, p. 6; EA/1, p. 123-125; LE 1961:10, p. 98; 1971:5, p. 80; HE 1961:10, p. 6; JA 1976:2-3, p.7; Paco 1981, (GDR eldono), p. 8; EA/2, p. 151-152; HI 1991:3, p.29; vd ĉap. 7.12; 7.13
Ezopo (Prologo-poemo en ES).
ES p. 9-23; ĉi-libre p. 25 (Fragmento).
Familiopatro
LM 1931/3; SK p. 134; EA/1, p. 125; KREMO p. 14; EA/2, p. 152-153.
Febro
OD p. 147.
Feina sorto
MkK p. 25-27; vd p. 8,13.
Festoj/Kiel en griz' de l' tagoj jaraj...
OD p. 129; IZOLO p. 35; vd p. 23; ĉap. 7.13

Flugemo
ES p. 56; Bona Espero 1976:marto, (1), p. 13.
Freneze
SK p. 183-188; EA/1, p. 136-142; EA/2, 161-166; vd ĉap. 7.13
Fruktoj
LM 1948/139-140; OD p. 127-128; Paco 1975, (GDR eldono), p. 10.
Giesswein
HE 1924:1, p. 3; GIESSWEIN MEMOR-LIBRO. Budapest, 1925. 248 p. (p. 93); Bulteno (HEK) 1957:7-8, p. 93-94; DF p. 5.
Ĝemo
LM 1923/232; SK p. 97; KREMO p. 9.
(Pl) (j) ***Ĝemo***
IZOLO p. 75.
(j) ***Gruoj*** (A. Kay).
LM 1938/5; EA/1, p. 155; KREMO p. 21; IZOLO p. 66; EA/2, p. 178; vd ĉap. 7.13
Hanto
OD p. 140.
Hermes kaj la lignohakisto
ES p. 78.
Himno de amo
SK p. 32.
Homo(46)
SK p. 62-63; ESEOJ I. p. 84-85; OD p. 115-116; KREMO p. 12-13.
(Pl) ***Hosana!***
VERSOJN p. 49.
Infanoj ĉe montrofenestro
LM 1924/175; SK p.136; ENY/2, p. 174; KREMO p. 10-11; EĈM p. 35; vd ĉap. 7.13
Inter du kverelantoj
ES p. 87.
Inter du malbonoj
ES p. 33.
Inter du virinoj
NLR 1. 1955:2, p. 41; ES p. 1o4; BI 1978:7-8, p. 4; ĉi-libre p. 26; en Interreto.
Inter ruinoj
LM 1949/41; DF p. 17.
Iras abiturient
HE 1920:12, p. 5; MkK p. 15-18; IL 1930:majo, p. 115-117; SK p. 41-43; EA/1, p. 120-123; BLK p. 88-91; EA/2, p. 148-151.
Izolo
OD p. 130-131; Paco 1977, (Hungara eldono), p.15; IZOLO p. 5; NĜ p. 23; Fonto 1991: 130 p. 9; vd ĉap. 7.13.
Jam kreskas la semo! (Je l' memortago de Zamenhof).
SK p. 12-13.
Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito 1919/Al la naskotag-festeno de Zamenhof en la jaro 1919
HE 1919:12, p. 1-3; Esperanto Triumfonta 1920:11, p. 1; MkK p. 7-10; vd p. 5, 8, 13.
Jen Rhodos!
ES p. 65.
Jes ja
IK 1947:13-14, p. 19; LA KONTRIBUO p. 10; Fonto 1993:151, p. 15; DF p. 23.

Kalendaro
NLR 1. 1956:6, p. 203-209; daŭrigo: 2. 1956:1, (7), p. 1-7; HV 1974:3, p. 8. (Fragmento); DF p. 29-33.
Kanto de vagabondo[47]
KE 1925:jan.-febr. p. 77; LM 1932/50-51. (Kun muziknotoj); SK p. 56-57; EPr p. 65; VkM p. 21; en la 1-a vol. p. 68, 70; vd ĉap. 7.12
(Pl) ***Kara Ludoviko***
BI 1976:10, p. 4; DF p. 1; en la 1-a vol. p. 11;
Kassandra
OD p. 139; IZOLO p. 47.
(Pl) ***Kelkaj malnovaj madrigaloj*** (Prologo-poemo).
IZOLO p. 28.
Kiel la infano
MkK p. 22; SK p. 49; vd ĉap. 7.13
Kien vi rajdas?
ES p. 107.
Kio estis
LM 1926/5; SK p. 73
(Pl) (j) ***Kiso***
IZOLO p. 73.
Kisoj[48]
KE 1924:jul.-aŭg. p.12; LM 1924/121; SK p. 93; VS 1933:14, p. 3; AD 2-a vol. p. 217-218; Esperantisto (Praha) 1960:7, p. 56; LE 1961:10, p. 94; BI 1981:10, p. 3; EPVT p. 100; IN MEMORIAM p. 29-30; VkM p. 27; E-aboco p. 175; vd en la 1-a vol. p. 68-69; ĉap. 7.12; 7.13
Knabino en fenestro
MkK p. 23-24; vd p. 8, 13.
Kompato
LM 1948/7-9; KREMO p. 23-28; EA/1, p. 148-155; IZOLO p. 50-52; EA/2, p. 171-177.
Konfuza balado -- pri neologismo kaj mondpereo
KREMO p. 19; IZOLO p. 22-23.
Kongresa runo
Flugfolie por la partoprenantoj de la 14-a UK en 1922; Uusi Suomi 1922.08.10; EF 1922:8-9, p. 136-137; Esperanto 1922/150; E-P 1922:9, p. 175-176; SK p. 21-23; EA/1, p. 115-117; LE 1961:10, p. 93; Informilo de la E-Societo en Turku 1969:52 (Postkongresa numero); en: V. Setälä: FORTOJ DE L' VIVO. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1967. 208 p. (p. 40-41); EA/2, p. 143-146; vd ĉap. 7.13.
Kongresa prologo/Saluton al la 22-a Kongreso (Oxford, 1930).
Esperanto 1930/135; SK p. 36-37.
Kongresa saluto -- Bern, 1947.
LM 1947/98-99; DF p. 20.
(Pl) (j) ***Konkluda deziro***
IZOLO p. 72.
(Pl) (j) ***Konsolo***
IZOLO p. 70.
(j) ***Konvalo***
NB 1963:2, (Suplemento); IZOLO p. 68; NĜ p. 35; vd ĉap. 7.13.

(Pl) (j) ***Konvinkiĝo***
IZOLO p. 71
(j) ***Krizo***
EA/1, p. 156; KREMO p. 21; HdE 1971:15, (1514), p. 3; IZOLO p. 75; EA/2, p. 178; vd ĉap.7.13
(Pl) (j) ***Kuraĝigo***
VERSOJN p. 29.
Kurioza kulto
ES p. 100.
La aglo kaj la alaŭdo
ES p. 116; NP 1968:2, p. 102; KAJ LA CETER' p. 99.
La aglo kaj la sago
ES p. 34; Bona Espero 1977:majo, (2), p.5.
La aglo kaj la vulpo
ES p. 115; NP 1968:2, p. 102.
La akuŝanta monto
ES p. 69
La arto poetika/Arto poezia (C.E.R. Bumy).
PGv p. 71-89.
I ***Ĉapitro***
LM 1931/213; EA/1, p. 111-114; EA/2, p. 140-143.
II ***Ĉapitro***
LM 1932/9.
III ***Ĉapitro*** (Fragmento).
AD 2-a vol. p. 218-219.
VI ***Ĉapitro***
LM 1932/99-100; NEK p. 381-382. (Fragmento).
La avarulo
ES p. 80.
La avida hundo
ES p. 75; HE 1964:9, p. 6.
La azeno kaj la griloj
ES p. 28; KPr p. 123; Boletin 1957:febr. (98); Fonto 1991:130, p. 9.
La azilo
OD p. 150.
La balado de Franco
IK 1948:1-2, p. 13; Fonto 1993:151, p. 20; DF p. 25.
La balado de Greklando
IK 1948:1-2, p. 13; Fonto 1993:151, p. 19; DF p. 25.
Laboro
IK 1946:9-10, p. 6; OD p. 134.
La brulanta saliko
LM 1926/5, SK p. 70.
La celoj ĉie dronis
EA/1, p. 145-146; OD p. 139; BI 1976:10, p. 1; IZOLO p. 44; BLK p. 91; EA/2, p. 169; UTAM p. 34; vd ĉap. 7.13
La cerbo
ES p. 41-44; Bona Espero 1976:marto, (1), p. 13; vd en la 1-a vol. p. 51.
La ĉevalo kaj la azeno
ES p. 51; Bona Espero 1976:marto, (1), p. 13.
(Pl) ***La disduiĝanta koro***
IZOLO p. 49.

La dua fronto
OD p. 147.
La enamiĝinta leono
ES p. 46.
(Pl) ***La fantomo de la milito***
VERSOJN p. 45-46.
La flatema maro
ES p. 96.
La fundamento kaj la palaco/Ho Esperanto!
LM 1947/1; OD p. 155-156; HV 1976:2, p. 21; IZOLO p. 8; AkF 1978:marto, p. 2; vd en la 1-a vol. p. 52; vd ĉap. 7.13
(Pl) ***La granda revo***
VERSOJN p. 41.
La griloj
NLR 1. 1955:2, p. 41-42: ES p. 27.
La gloro de la regolo
ES p. 63.
La grilo kaj la formiko
ES p. 29.
(Pl) ***La grilo kaj la formiko*** (Dialogo).
Penseo 1992:28-29, p. 3 ; DF p. 40.
(Pl) (j) ***La historio***
IZOLO p. 72..
La hundo en la stalo
ES p. 88; Bona Espero 1980:okt. (-), p. 11.
La instruo de la cervino
ES p. 55..
La interna ideo
KVARA RAPSODIO p. 35; DF p.19.
La juĝo de la simio
ES p. 40; Bona Espero 1980:okt. (-), p. 7.
La juĝo de Momos
ES p. 89.
La kankro kaj la serpento
ES p. 122.
La kapitan' el Berno (Honore al s-ro Stettler).
Flugfolie por la ĉeestantoj de la 25-a UK; Esperanto 1933/147; HdE 1933:32-33, (737-738), p. 7; □ KE 1933:sept.-okt. p. 198-199; DF p. 11.
(Pl) ***La katino fidas/Mica***
BrE 1976:nov.-dec. (814), p. 174; VERSOJN p. 39; en la 1-a vol. p.77; vd ĉap. 7.13
La kripla Pegazo
Esperanto Triumfonta 1921:3, (23), p. 2; Esperanto 1923/203; SK p. 118-119.
La kverko kaj la kano
ES p. 53.
Lalla...lalla...
SK p. 51.
La lango kaj la mano
ES p. 95; Boletin 1957:febr. (98), p.18; Bona Espero 1976:jun. (2), p. 14.

La leono, la vulpo kaj la azeno
ES p. 39.
La leporo kaj la testudo
ES p. 85-86; REI 1955:10, (599) p. 192; ELL p. 203-204.
La leporoj kaj la vulpoj
ES p. 72; KAJ LA CETER' p. 99.
La lupo kaj la ŝafido
ES p. 37; Boletin 1957:febr. (98), p. 18.
La maljunulo kaj la morto
ES p. 106.
La malsana korvo
ES p. 49.
La mensogema paŝtisto
ES p. 83; NP 1968:2, p. 99; Bona Espero 1983:jan. (-), p. 7; 1985:sept. (3), p. 13.
La mesaĝo de Nazim Hikmet
LM 1947/101; Esperantista (Praha) 1951:2, p. 13; LSS 1958:6, p. 94; La Revuo Orienta 1959:5, p. 10-11 (Fragmento); OD p. 153-154; en la 1-a vol. p. 59; vd ĉap. 7.13
La monedo kaj la pavoj
Esperanto 1955/192; ES p. 62; Bona Espero 1976:sept. (3), p. 14.
(Pl) ***La morto de Lurkó***
VERSOJN p. 40; en la 1-a vol. p. 74.
La mulo kaj la di-statuo
ES p. 59; Bona Espero 1981:jan. (1), p. 5.
La muso kaj la rano
ES p. 114.
La nigra rajdanto
IL 1931:jun. p.114; SK p. 59 ; TBE 1963:sept. p. 130; NB 1963:2, (Suplemento); OD p..114; VkM p. 39; vd ĉap. 7.12; 7.13
La oreloj de la leporo
ES p. 73.
La ovoj
ES p. 77
La paŝtisto kaj la leono
ES p. 70.
La plej granda kulpulo
ES p. 108-113; NP 1968:2, p. 100-102.
La potenca najbaro
ES p. 35.
La prognozo
ES p. 101.
(Pl) ***La providenco***
KAJ LA CETER' p. 98; DF p. 39.
La putoro kaj la kokido
ES p. 45; HFM 1960:4, p. 58.
Larmoj
HE 1921:11, p. 1; DF p. 4.
La ranoj volas reĝon
ES p. 31; Bona Espero 1976:dec.(4), p. 7.

La rano kaj la bovo
ES p. 64; NP 1956:4-5, p. 145; ESZPERANTÓ/E p. 190.
La renkontoj de kantoj/La retrovitaj kantoj (Prologo por la finna literatura vespero de hungaraj esperantistoj).
SK p. 19-20.
(Pl) (j) ***La semoj***
IZOLO p. 67.
(j) ***La senhonta rozo*** (A. Kay).
LM 1938/5; IZOLO p.65.
La simio kaj la delfeno
ES p. 66; Bona Espero 1983:jan. (--), p. 7.
La societo de Pluto
ES p. 81.
La spuroj
ES p. 48.
La subtasoj
LM 1947/117; DF p. 21.
(Pl) ***La tago de kolero***
VERSOJN p. 47.
La taŭro kaj la kulo
ES p. 58; Bona Espero 1976:sept. (3), p.14.
La tornistro
ES p. 38.
La trovita hakilo
ES p. 76.
Laŭ ĉies plaĉo
ES p. 98-99.
La ursfelo
ES p. 60-61.
La venkonto (Al J. S. Dinwoodie).
LM 1949/71; DF p. 27.
La vulpo kaj la gruo
ES p. 50: Bona Espero 1975:jan. (1), p. 13; 1980:jul. (--), p. 11.
La vulpo kaj la kapro
ES p. 91-92.
La vulpo kaj la korvo
ES p. 67.
La vulpo kaj la masko
ES p. 68; JA 1981:4, p. 3; DJE 1997:2, p. 35; VkM p. 40; vd ĉap. 7.12
La vulpo kaj la vinbero
ES p. 82; ENY/1 p. 71; EPr p. 66; LF 1991:133, p. 13; EPVT p. 26; DJE 1997:2, p. 15; vd.ĉap. 7.13
Lenin(*)
IK 1947:6-7, p.15; E-S 1951:10, p. 140; 1970:2, p. 21; 1977:1, p. 1; LSS 1957:5, p. 80; Bulteno (HEK) 1957:11-12, p. 133; HE 1962:11, p. 1; OD p. 152; Internaciisto 1976:4, p. 11; Paco 1977, (Hungara eldono), interna kovrilpaĝo; BI 1977:11, p. 1; Fonto 1993:151, p. 14.
Leona divido
ES p. 36; NP 1968:2; p. 99; derE 1969:28-29, p.27; DJE 1997:2, p. 23; ĉi-libre p. 25.
Leonfelo
ES p. 57.
Letero al Julio Baghy/Jubilea letero al Julio Baghy
AD p. 11-15; IZOLO p. 14-18; en la 1-a vol. p. 4. (Fragmento).

(Pl) ***Letero al la "Vagabondo"***
VERSOJN p. 9-13; en la 1-a vol. p. 80-81. (Fragmento).
Letero al William Auld
Esperanto 1957/152-153; OD p. 157-161; LF 1976:37-38, p. 2; BLK p. 92-97.
Libero
ES p. 30.
(Pl) (j) ***Likvido***
VERSOJN p. 30.
(Pl) (j) ***Lilio***
IZOLO p. 68.
Ludo (A. Kay).
LM 1938/30; EA/1, p. 144-145; OD p. 133; FE 1976:apr.-majo (298), titolpaĝe; IZOLO p. 55; EA/2, p. 168; vd en la 1-a vol. p. 52.
Lunsorĉo
LM 1948/138-139; OD p. 128-129
Maja idilio
LM 1923/125-126,136 (Kun muziknotoj); 1934/138-139; SK p. 83-92; AD 2-a vol. p.316-327, (Teatraĵeto); VkM p. 41-52; vd ĉap. 7.12
Fragmentoj:
Iru, iru tra la pord'
Pioniro 1969:5, p. 5; OD p. 118.
Heliketo, heliket'
Pioniro 1969:5, p. 5; OD p. 118-119; (Laŭ ĉinesko Yishaonien, adaptaĵo de Guozho) en: Penseo 1998:79, p. 4.)
Venton serĉas velo
Pioniro 1965:5, p. 5; KPr p. 57-58; OD p. 119.
Ŝafideto, ŝafidet'
GE 1931:10, p. 155; ESk 1951:16, p. 6; OD p. 119; Pioniro 1969:5, p. 5; KREMO p.8; JA 1979:2, p. 10; LF 1992:137, p. 153-155; en la 1-a vol. p. 67-68, 71; vd ĉap. 7.13
Turnu, turnu, turnu vin
OD p. 120
(Pl) (j) ***Malamo***
IZOLO p. 69; NĜ p. 33; vd ĉap. 7.13
Maldolĉa kanto
MkK p. 14-15; SK p. 46-47; KPr p. 55-56; vd p. 8.
Maljuna fraŭlo
LM 1931/3; SK p. 135; EA/1, p. 126; KREMO p. 14; EA/2, p. 153.
Malkuraĝo
SK p. 71.
Marks*
IK 1947:6-7, p. 15; E-S 1951:10, p. 139; Fonto 1993:151, p. 13; DF p. 22.
Mastroŝanĝo
ES p. 32; KPr p. 123.
(Pl) ***Mia koro, via koro***
VERSOJN p. 35.
Mi amas vin...
LM 1948/137; OD p. 122-123; AER 1967:apr.-jun. (4-6) p. 6; IZOLO p. 29-30; vd p. 2.
Milda deziro
LM 1926/5; SK p. 72.
...

Mil mil virinoj...
LM 1948/137; OD p. 124; IZOLO p. 31.
Mondhaveno
SK p. 117; KPr p. 59.
Mortis Grabowski
Esperanto Triumfonta 1921:60, p. 1; SK p. 17-18; Internaciisto 1976:4, p. 4; Esperanto 1976/42; HFM 1987:1, p. 8-9; vd ĉap. 7.13
Naiva poemeto/Je la naskiĝtago de Zamenhof
HE 1923:1, p. 3-4; SK p. 16; Paco 1963:121, (Hungara eldono), p. 3; BI 1986:12, p. 4; VkM p. 57; vd ĉap. 7.12
Narkotomanio
OD p. 138; IZOLO p. 45.
Ne...Ne...
OD p. 140; Paco 1977 (Hungara eldono), p. 15.
(Pl) (j) ***Nervozo de l' epok'***
VERSOJN p. 25.
Neŭtraleco
LM 1947/117; LSS 1947:novembro, p. 5; DF p. 21.
Ni laŭdu lin -- Je la mortotago de Zamenhof
MkK p. 5-6; SK p. 14-15; HE 1964:4, p. 2; BI 1982:4, p. 1; HdE 1983:5, (1712), p. 1; NEK p. 372-373.
Nur unu, sed...
ES p. 52;NP 1956:4-5, p.145; ENY/1, p. 88; EPVT p. 26; vd ĉap. 7.13
Oktobra odo al la tridekjara Sovjetunio*
IK 1947:16, p. 7; Fonto 1993:151, p. 16-18; DF p. 24.
Pala procesio
LM 1923/174; SK p. 127-139.
Papavo
OD p. 125; Paco 1975, (GDR eldono), p. 10.
(Pl) (j) ***Paradiza eraro***
IZOLO p. 72.
Parazitoj
ES p. 79.
Patrineco
LM 1924/110-111; SK p. 127-133.
Partizanoj
OD p. 145.
***Patrujo mia...*(1942)**
LM 1948/165; DF p. 14.
***Patrujo mia...*(1945**
LM 1948/165; OD p. 151; HV 1970:1, p. 9.
Perspektivoj
OD p. 148; vd en la 1-a vol. p. 52.
Plena ventro
ES p. 74.
Plendo de Don Juan[49]
LM 1924/147, DF p. 6.
Pli ol amo/Kiel peza gut' miela
OD p. 129-130; IZOLO p. 42; vd p.23.
Poploj en aleo
MkK p. 12-13; Esperanto 1922/26; □ IL 1930:majo, p. 116; SK p. 105-106.

Por fuĝi for... (Prologo-soneto en ETERNA BUKEDO).
EB p. 9; SKIZO p. 33.
Pri la statuo de Ezopo
ES p. 7.
(Pl) (j) ***Principoj***
VERSOJN p. 28.
Pri nia kor'
Esperanto 1921/189; 1971/196; MkK p, 6-7; BE 1976:6, p. 9; vd p. 8, 13.
Printempa sorĉo
MkK p. 28-29; SK p. 52-53.
Printempo
MkK p. 30; SK p. 107; HE 1964:3, p. 6; VkM p. 60; vd ĉap. 7.12
Prologo antaŭ Ginevra
SK p. 29-31.
Prologo antaŭ la teatra vespero (Por la postkongresa aranĝaĵo en Budapeŝto, 1921); HE 1921:9-10, p. 18; DF p. 2.
Prologo-poemeto (Je la apero de Literatura Mondo).
LM 1922/3; DF p. 3)
Protesto(50) (A. Kay).
LM 1937/11; OD p. 131; IZOLO p. 62; KAJ LA CETER' p. 50; EĈM p. 59; vd ĉap. 7.13
(Pl) (j) ***Protesto***
VERSOJN p. 26.
(Pl) (j) ***Prudentigo***
VERSOJN p. 27.
(j) ***Prujno*** (A. Kay).
LM 1938/5; ESk 1951:16, p. 7; IZOLO p. 67.
(Pl) ***Rekviem' eterna***
VERSOJN p. 48.
Renkonto al la Luno
LM 1923/10-12; SK p. 60-61
(Pl) (j) ***Respondo***
IZOLO p. 70.
Retrovo
Informilo (HESL) 1945:2. p. 5; Esperantista (Praha) 1946:5-6, p. 50; DF p. 18.
(j) ***Revo***
LM 1938/5; ESk 1951:16, p. 7; NB 1963:2, (Suplemento); IZOLO p. 66; NĜ p.. 31; vd ĉap. 7.13
Ribeleto
MkM p. 25; SK p. 50; KREMO p. 9. ; vd p. 2; ĉap. 7.13.
Ridu, kara(51)
SK p. 80.
Rondelo de Montevideo
REI 1955:9, (598), p. 260; OD p. 156; Eventoj 2/decembro, 1994, 0068, p. 2.
Rotterdamo
OD p. 142-143.
Rustas la plumo/Delonge mia Muz' silentas
LM 1926/140; SK p. 102.
Ŝi amas min
SK p. 79.
Ŝi dormas
LM 1926/157; DF p. 9.

Ŝiritaj strofoj
MkK p. 20-21; SK p. 48.
Saluto (Por la deka naskiĝtago de la Grupo Egressy).
HE 1969:6, p. 5; DF p. 38.
Se ekbrulus...
MkK p. 18; SK p. 44; VkM p. 69; vd ĉap. 7.12; 7.13
Senrezerve
LM 1948/165; OD p. 151-152; HV 1970:1, p. 9; derE 1970:40-41, p. 5; BI 1976:1, p. 1.
Septembro 1939
OD p. 141-142
(j) ***Serenado*** (A. Kay).
LM 1938/5; IZOLO p. 65.
Serenado (Malnova madrigalo)
LM 1948/140; VERSOJN p. 33-34.
Serĉata
OD p. 149.
(Pl) ***Se vi koleras***
IZOLO p. 36-37.
Silente, nigre...
MkK p. 21; SK p. 45; HdE 1967:7, (1434), p. 3; KREMO p. 8; VkM p. 72; vd ĉap. 7.12
Silento
LM 1924/47; SK p. 95; ESk 1951:16, p. 7; KREMO p. 9.
Sincere
ES p. 47.
Soldatkantoj
OD p. 150.
Soldatoj marŝas (1944)
LM 1948/165; DF p. 15.
Somernokto/Nokto de somero
LM 1948/138; EA/1, p. 143-144; OD p. 123; ESZPERANTÓ/E p. 280-281; KREMO p. 29; EA/2, p. 167-168.
Somero
MkK p. 30-31; Esperanto 1925/132; SK p. 108; HE 1964:7, p. 10; VkM p. 75; vd ĉap. 7.12
Sonorilludo
HE 1919:7, p. 2-3; Esperanto Triumfonta 1920:8, p. 3; MkK p. 3-4; SK p. 9-10; LE 1961:10, p. 93; KREMO p. 7; NZE 1951:511, p. 2; ĉi-libre p. 7.
Sopiro
SK p. 96.
Sopiro paŝu pidpinte...
HdE 1967:7, (1434), p. 3; IZOLO p. 33-34.
Spite
LM 1925/21; SK p. 176-177; vd ĉap. 7.13
Stalin(*)
IK 1947:6-7, p. 15; E-S 1951:10, p. 140; Fonto 1993:151, p. 15; DF p. 22.
Stelo super la Wawel (Kongresa saluto).
LM 1931/129; DF p. 10.
Streĉita Kordo (Prologo-poemo).
SK p. 5-6; HdE 1971:15, (1514), p. 3; KREMO p. 6; ĉi-libre p. 13. (Fragmento).
(Pl) ***Subita frosto***
IZOLO P. 38.
Sub Moskvo
OD p. 145; Paco 1975, (Hungara eldono), p 15; 1976:4, p. 5; BE 1976:6, p. 9.

Sunsubiro
SK p. 74; KREMO p. 10; vd ĉap. 7.13
Supren la korojn/Korojn supren[52]
MkK p. 10-11; SK p. 11; BENY p. 112; HE 1966:10, p. 3.;
(Pl) ***Sur freŝa, rosa, florodora...***
IZOLO p. 39-41.
Sur la monto Nebo/Soneto
